


IL POPOLO CINQUE

中國報

3

1985





Huangshan-monto post neĝo

Foto de SUN JONGSŬE

Enhavo

Politiko: Konstrui socialismon kun ĉinaj trajtoj	2
Medicino: Akupunkturo kaj mokso — tradiciaj kuracmetodoj de Ĉinio	
Kiel kuraci malsanojn per akupunkturo kaj mokso	4
La plej fruaj akupunkturo kaj mokso kaj ilia nova disvolviĝo	7
Akupunkturo kaj mokso servas al la homaro	10
Esperanto:	
Retrospektive kaj perspektive	20
Ĉinio jam havas Esperanto-eldonejon	23
Esp-Novajoj	26
Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (3): Bela Ŝjigaze	50
Agrikulturo: Riĉa vilaĝo en norda Ŝanŝji	28
Malfermita urbo: Daljan, pordo de Nordorienta Ĉinio	16
Mikronoveloj:	
Sur monta vojeto	40
Ĉi-vespera siringo	41
Arto:	
Heroa kaj ĉarma “Legendo pri Mulan”	11
Mej Lanfang kaj la Pekina Opero	36
Sporto: Konkurso de Drakboatoj	42
Virinoj: Viglaj ĉinaj virinoj	45
Religio: Miljara templo de ĉina taoismo	60
Antikva kulturo: Silkaĵoj de la antikva Ĉinio	56
Vojaĝo tra Ĉinio: Lŭojang, urbo abunda je antikvaj restaĵoj	31
Amikeco:	
“Floro de Orienta Eŭropo” en Ĉinio	62
Finna kampano Hoffren kaj Ĉinio	65
Inter ni: El leteroj de niaj legantoj	67
Kurantaj aferoj	47
Korespondi deziras	68
SUR LA KOVRILO: Sceno el la pekina opero “Jang Gujfej”	de CAJ HAJFENG
INTERNE DE LA KOVRILO: Hŭangŝan-monto post neĝo	
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Soifa birdo ĉe fontano	
SUR LA DORSKOVRILO: En Cervobredejo (Ĉinstila pentraĵo)	de JU ĜIŜJŬE

JARABONTARIFO		Francio	FF	60.00	Japanio	Yen	2 000.00	Usono	US\$	10.00	
Aŭstralio	\$A	FR Germanio	DM	18.00	Jugoslavio	Din.	300.00	Kanado	Can\$	10.00	
Britio	£	Hispanio	Pts	900.00	Nederlando	Gld.	22.00				
		Italio	Lit	11 000.00	Portugalio	Esc.	700.00				
Por aliaj landoj en Eŭropo:	£	5.00	US\$	8.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:			£	2.80	US\$	4.00



Deng Ŝjaŭping

Iuj legantoj demandis nin, kia estas socialismo kun ĉinaj trajtoj. Por ke ili havu klaran konon pri tio, ni aperigas jenan artikolon.

— La Red.

Antaŭ du jaroj ĉina gvidanto Deng Ŝjaŭping montris, ke por sia moderniĝo Ĉinio devas ekiri de realo, kombini la universalan veron de Marksismo kun sia konkreta praktiko, iri sian propran vojon kaj konstrui socialismon kun siaj propraj trajtoj.

Lastatempe li intervidiĝis kun fremdlandaj amikoj. Multaj el ili kun granda intereso demandis lin, kia estas socialismo kun ĉinaj trajtoj. Li faris precizan priskribon pri tio.

PLEJ GRAVE POR ĈINIO ESTAS PERSISTI EN SOCIALISMO

Koncerne la demandon de socialismo kun ĉinaj trajtoj, Deng Ŝjaŭping diris, ke de post la Tria Sesio de sia 11-a CK la Komunista Partio de Ĉinio ellaboris la liniojn ideologian, politikan kaj organizan kaj serion da principoj kaj politikoj. Kio estas la ideologia linio? Ĝi signifas persisti en Marksismo, en ĝiaj dialektika materiismo kaj historia materiismo, t.e., persisti en la principo serĉi veron el faktoj interpretita de Maŭ Zedong. Plej grave por Ĉinio estas persisti en Marksismo, ankaŭ plej grave persisti en la socialisma vojo. Li diris, ke en unu kaj duona jarcento

ŜIN HŬA:

KONSTRUI SOCIALISMON

toj post la Opia Milito Ĉinio estis agresata kaj humiligata. La ĉina popolo akceptis Marksismon kaj persistis en la socialisma vojo, tiel ke la ĉina revolucio gajnis venkon.

Koncerne la demandon, ĉu la ĉina popolo povus stariĝi kaj Ĉinio povus liberiĝi, se Ĉinio ne irus la socialisman, sed kapitalisman vojon, Deng Ŝjaŭping diris, ke Kuomintango iris la duan vojon pli ol 20 jarojn, tio pruvis tiun vojon ne taŭga por Ĉinio. La Komunista Partio de Ĉinio, persistante en Marksismo, kombinante ĝin kun la praktiko de Ĉinio laŭ Maŭzedong-penso kaj irante sian propran vojon, vojon ĉirkaŭigi la urbojn per la kamparo, gajnis la venkon de la ĉina revolucio. Se ni ne estus marksistoj, ne kombinus Marksismon kun la praktiko de Ĉinio nek irus nian propran vojon, Ĉinio nun restus ankoraŭ separatisma kaj ne akirus sendependiĝon nek unuiĝon. Por malkaŝe diri, Ĉinio devas ne nur plene kredi Marksismon, sed eĉ persisti en ĝi, alie la ĉina revolucio ne povas gajni venkon. La kredo estas movforto por ni. Se ni ne irus la socialisman, sed kapitalisman vojon post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ni ne povus fini la malordon de Ĉinio, nek forigi inflacion, malriĉecon kaj postiĝintecon. Li diris, ke la malnova Ĉinio havis mizeran bazon. Ĝia industrio prezentis preskaŭ nenion kaj ĝia greno ne sufiĉis por ĝia loĝantaro. Tial por Ĉinio necesas socialismo anstataŭ kapitalismo. Ni devas solvi problemojn de manĝo, laboro kaj landunuiĝo. Tial ni plurfoje deklaris, ke ni devas persisti en Marksismo kaj la socialisma vojo. Tamen nia Marksismo devas esti tiu kombinita kun la realo de Ĉinio kaj nia socialismo tiu konforma al la realo de Ĉinio kaj havanta ĉinajn trajtojn.

MALRIĈECO NE SIGNIFAS SOCIALISMON, DES PLI NE KOMUNISMON

Koncerne socialismon kaj Marksismon, Deng Ŝjaŭping diris, ke antaŭe oni ne havis tre klaran konon pri tio. Marksismo donas grandan atenton al disvolvo de produktaj fortoj. Nia komunismo signifas "de ĉiu laŭ lia kapablo, al ĉiu laŭ

KUN ĈINAJ TRAJTOJ

lia bezono". Tio postulas, ke la sociaj produktaj fortoj disvolviĝu en treege alta grado kaj la socia riĉaĵo estu ekstreme abunda. Tial la plej ĉefa tasko de la socialisma etapo estas disvolvi produktajn fortojn. La supereco de socialismo montriĝas en tio, ke ĝiaj produktaj fortoj disvolviĝas pli alte kaj pli rapide ol tiuj de kapitalismo. Se oni diras, ke ni havis mankon post la fondiĝo de la nova Ĉinio, do ĝi estas, ke ni certgrade neglektis disvolvon de produktaj fortoj. Ni opinias, ke malriĉeco ne signifas socialismon, des pli ne komunismon. La supereco de socialismo estas paŝo-post-paŝe disvolvi produktajn fortojn kaj plibonigi la materian kaj kulturan vivon de la popolo. Li diris, ke en la estiĝinta Ĉinio ni alfrontas la problemon, kiel disvolvi produktajn fortojn kaj kiel plibonigi la vivon de la popolo. En la fina analizo, tio estas demando ĉu iri la socialisman aŭ kapitalisman vojon. Se Ĉinio ne irus la socialisman, sed kapitalisman vojon, tio ebligus riĉigi nur malpli ol centonon de la loĝantoj kaj absolute ne la ceterajn. Tial ni devas persisti en la socialisma vojo. Ni faras distribuadon laŭ la socialisma principo "al ĉiu laŭ lia laboro", tio ne estigos tro grandan diferencon inter riĉeco kaj malriĉeco. Tiel, post 20-30 jaroj, kiam niaj produktaj fortoj disvolviĝos, ne okazos polarizo.

BONHAVA SOCIO DE ĈINIO EN LA FINO DE TIU ĈI JARCENTO

Iuj fremdlandaj amikoj demandis, kio estas la celo de konstruado de socialismo kun ĉinaj trajtoj. Deng Ŝjaŭping diris, ke la minimuma celo de la kvar modernigoj de Ĉinio, oni povas diri, estas ŝanĝi la ĉinan socion en tiun bonhavan en la fino de la kuranta jarcento. Tion li traktis unuafoje en dec. 1979, dum interparolo kun Ohira Masajoŝi, la tiama ĉefministro de Japanio. La "bonhava socio" signifas, ke la pokapa jara enspezo de ĉino atingos 800 usonajn dolarojn en la fino de tiu ĉi jarcento. Tio estos mizera sumo por la evoluintaj landoj, sed per tio Ĉinio povos iom ŝanĝi sian situacion de malriĉeco kaj

postiĝinteco. Por atingi la celon, oni devas fari grandegan penadon. Ĉinio havas miliardon da loĝantoj. La totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo en la fino de la kuranta jarcento atingos mil miliardojn da usonaj dolaroj. Se ni farus distribuadon laŭ kapitalisma principo, ni ne povus liberigi nin de la malriĉeco kaj postiĝinteco, nome, nur malpli ol centono de la loĝantoj vivus bone, dum la ceteraj ankoraŭ mizere. Se ni faros distribuadon laŭ la socialisma principo, la tuta popolo fariĝos bonhava. Socialismo kun ĉinaj trajtoj ja celas konstrui bonhavan socion en la fino de la kuranta jarcento.

NEEBLAS SUKCESE KONSTRUI POST FERMITA PORDO

Deng Ŝjaŭping opinias, ke la nuna mondo estas malfermita. La pordferma politiko longe aplikata en la historio kaŭzis al ni postiĝintecon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio oni iagrade sekvis tian politikon, kiu alportis al ni malfacilojn. Kompreneble ankaŭ iuj "maldekstraj" politikoj, precipe la kultura revolucio, donis al ni katastrofon. Unuvorte, la sperto akirita dum la pasintaj pli ol 30 jaroj montras, ke neblas sukcese konstrui post fermita pordo nek disvolviĝi pluen.

Li diris, ke nia politika linio estas preni la modernigan konstruadon kiel nian ĉefan laboron kaj persiste disvolvi produktajn fortojn. Ni devas firme teni tiun bazan ĉeneron, escepte se eksplodos mondmilito. Sed ni daŭrigos nian konstruadon post la mondmilito, se ĝi okazos.

Li diris, ke neblas sukcese konstrui post fermita pordo. Estas du specoj de pordfermo: Unu estas fermi la pordon al la eksteraj landoj kaj la alia enlande, ekz., iu regiono aŭ fako fermas la pordon al alia regiono aŭ fako. Ni opinias, ke Ĉinio devas disvolviĝi iom pli rapide, sed ne tre rapide, alie tio ne konformos al la realo de Ĉinio. La produktaj fortoj ne povas disvolviĝi pluen, se oni konstruas post fermita pordo.

VIGLIGI LA EKONOMION ENLANDE KAJ PRAKTIKI LA MALFERMAN POLITIKON AL LA ALIAJ LANDOJ

Parolante pri tio, kiel rapidigi la socialisman konstruadon de Ĉinio, Deng Ŝjaŭping montris, ke ni devas vigligi la ekonomion enlande kaj praktiki la malferman politikon al la aliaj landoj. Ni devas unue solvi la problemon de la kamparo, kies loĝantaro konsistigas 80% de tiu de Ĉinio. Ĉu
(Daŭrigo sur p. 24)

KIEL KURACI MALSANOJN PER AKUPUNKTURO KAJ MOKSO

de ŬANG BENŜJAN*

AKUPUNKTURO kaj mokso estas ĉefaj tradiciaj terapioj de Ĉinio. Krom mildigi doloron, ili povas ankaŭ batali kontraŭ inflamo, reguligi la funkcion de homaj organoj kaj altigi imunecon, tial ili estas uzataj por kuraci malsanojn, inkluzive kronikajn malsanojn, cekumiton, disenterion kaj aliajn akutajn malsanojn. Akupunktura anestezo ĉe gravaj operacioj eliminis flankan efikon kaj kuracan akcidenton, kiujn povas kaŭzi droga anestezo.

Kial malgranda pinglo povas ludi tiel grandan rolon? Kiel kuraci malsanojn per akupunkturo kaj mokso? Ĉinaj sciencistoj faris esploradon per modernaj medicinaj rimedoj, kaj tio jam progresis kaj daŭre progresos.

KIO ESTAS AKUPUNKTURO KAJ MOKSO?

Akupunkturo estas pingla pikado, t. e. enpiki malsamajn pinglojn en certajn korpajn punktojn de homo kaj diversmaniere manipuli ilin por mekanike stimuli la internajn organojn. Tio celas reguligon de organisma funkcio kaj forigon de inflamo kaj doloro.

Mokso estas bruligi bastone-tojn aŭ rulaĵojn el sekaj artemiziaj folioj por varmigi aŭ kaŭteri certajn korpajn punktojn sur homa haŭto por preventi kaj kuraci malsanojn per varma ekscito de koncernaj organoj.

Ambaŭ kuracmetodoj estas fizikaj terapioj. En la lastaj jaroj oni aplikis iujn medikamentojn al korpaj punktoj surbaze de la tradiciaj terapioj de akupunkturo kaj mokso por pliigi la efikon. Tio estas fizika kaj kemia ekscito de koncernaj korpaj punktoj en kombino. Krome, oni faris ankaŭ eksciton per lumo, elektro, mikroondo, lasero kaj aliaj, kaj aldone iujn kirurgiajn operaciojn por intensigi la eksciton kaj plialtigi la efikon de akupunktura kaj moksa terapioj.

Kun la progreso de sciencoj, tagon post tago plimultiĝos tiaj ekscitaj terapioj, tamen ili donas sian efikon nur per korpaj punktoj kaj kanaletoj kunligantaj la histojn kaj epidermon. Tio diferencigas la akupunkturon kaj

mokson disde la aliaj fizioterapioj kaj estas ilia plej ĉefa karakterizaĵo.

VARIAJ TERAPIOJ

Antikvaj ĉinaj medicinistoj trovis pli ol 660 akupunkturajn kaj moksajn punktojn sur homa korpo. Pingla enpikado kaj kaŭterizo sur tiuj punktoj povas vekii reakcion de aliaj korpaj partoj aŭ organoj kaj naski kuracan efikon. Jen tradiciaj akupunktura kaj moksa terapioj de Ĉinio nun aplikataj.

Surbaze de la antikvaj akupunkturo kaj mokso, aperis multaj novaj terapioj. Ekzemple:

Elektrapingla terapio: Enpikinte pinglon en certan korpan

La aŭtoro kaj japanaj akupunkturaj fakuloj en Japanio



punkton, manipulanto provizu la pinglan tenilon per konvena kurento. La kurenta tensio kaj la elektriza tempo malsamas laŭ malsamaj malsanoj. La terapio per elektrapingla aŭ fizioterapia aparato estas sekura.

Likva injektado: Injekti en certan korpan punkton certan dozon da fiziologia salakvo aŭ injekta akvo aŭ kemia injektaĵo por intensigi la eksciton. Ekzemple, injektado de 1-5 miligramoj da dolantino en certan korpan punkton faras efikon egalan ĉe injektado de kelkdek, eĉ cent miligramoj da dolantino en alian muskolan parton.

Magneta terapio: Fiksi per sparadrappo magnetajn platon aŭ grajnoj al certa korpa punkto. Tiu simpla kaj sekura terapio estas ĝenerale aplikata al kuracado de hipertensio, bronka astmo, reŭmatisma artrito kaj aliaj.

Kapa akupunkturo: Enpiki pli longan kaj pli dikan pinglon en certan punkton de kapa haŭto kaj rapide turni la enpikitan pinglon. Tiu terapio kuracas malsanojn ĉefe de nerva sistemo. Sur la homa kapo troviĝas dekoj da punktoj, al kiuj oni povas fari tradician akupunkturaron.

Akupunkturo




Mokso

Elektravarma mokso: Eksciti certajn korpajn punktojn per elektra varmo. Malsanoj kuracblaj per la tradicia mokso povas esti kuracataj per elektra varma mokso.

Krome, troviĝas ankaŭ enkarna pinglo-resta terapio, t. e. fiksi per sparadrappo la pinglojn enpikitajn en korpajn punktojn je 3-5 tagoj

ĝis unu semajno, por fari longtempan eksciton, ore la akupunkturo kaj aliaj. Tiuj terapioj ankaŭ bone efikas.

Ĉar akupunkturo kaj mokso povas reguligi la organisman funkcion de homo kaj forigi inflamon kaj doloron, ili povas kuraci multajn malsanojn. Oni trovis, ke ili havas kuracan efikon sur pli ol 200 malsanoj kaj pli bone sur ĉ. 100 malsanoj, inter kiuj troviĝas bakteria disenterio, kontaĝa hepatito, ftizo kaj aliaj kontaĝaj malsanoj; bronka astmo, hipertensio, stomaka doloro, diabeto, paraplegio, dispepsio, enurezo kaj aliaj internaj kaj infanaj malsanoj; erizipelo, hemoroidoj, uretra infektiĝo, rena koliko, polucio, impotenteco, neŭrodermatito kaj aliaj kirurgiaj malsanoj kaj dermatozoj; neregula menstruo, nenormala feta pozicio, funkcia uterosangado, graveda



Lasera akupunkturo

vomado kaj aliaj ginekologiaj malsanoj; miopeco, kolorblindeco, orela zumado, akuta tonsilito, denta doloro kaj aliaj; kaj droniĝo en akvo, sunfrapo, ŝoko kaj aliaj.

La Monda Sana Organizo de UNO, laŭ klinika sperto, prezentis 40 malsanojn kuraceblajn per akupunkturo kaj mokso, inter kiuj estas kronikaj kaj bakteriaj akutaj malsanoj de la supra spira kanalo, buŝkavo, okulo, gastroentero, nerva sistemo, muskolo kaj osto.

Tiun nombron multe superas tiu de la malsanoj fakte kuraceblaj per akupunkturo kaj mokso. Kompreneble, akupunkturo kaj mokso ne povas kuraci ĉiajn malsanojn. Ĉar ili ne faras malbonan efikon, oni povas senĉese esplori la kuraceblajn malsanojn kaj profundigi sian konon pri ili.

KIAL AKUPUNKTURO KAJ MOKSO POVAS KURACI MALSANOJN?

Akupunkturo kaj mokso faritaj al korpaj punktoj de homa korpo povas produkti sendolorigan reakcion kaj kuracan efikon sur koncernaj partoj aŭ organoj. Tra

kiu vojo akupunkturo kaj mokso produktas tian efikon? Laŭ la tradicia ĉina medicino, oni opinias, ke ili efikas pere de diversaj kanaletoj (*ĝinglŭo*).

Laŭ *ĝinglŭo*-teorio, en la homa korpo dise troviĝas multaj vertikalaj trunkaj kanaletoj (*ĝing*) kaj iliaj multaj branĉoj (*lŭo*). Ili interkruciĝas en la tuta korpo kaj per tio kunligas histojn de la internaj organoj, epidermon, kapon, trunkon kaj la membrojn. Tial la ekscititaj sentoj de doloro, formikado, ŝveliĝo kaj pezo kaŭzigitaj de akupunkturo povas iri tra certaj kanaletoj kaj disetendiĝas. La sentoj faritaj de akupunkturo kaj mokso ĉe certaj korpaj punktoj povas iri tra certaj kanaletoj, atingi koncernajn korpajn partojn aŭ organojn kaj produkti reakcion kaj kuracan efikon. Pro tio *ĝinglŭo*-teorio povas gvidi la akupunkturajn kaj moksan terapiojn.

La nunaj sciencaj laborantoj akceptis la vidpunkton de antikvaj ĉinaj medicinistoj, faris profundan esploron kaj konstatis la efikon de akupunkturo kaj mokso pere de diversaj kanaletoj.

Ni prenas kiel ekzemplon akupunkturajn influojn al la korbata

rapideco. Akupunkturo al la punkto *nejgŭan* kaj aliaj de kormalsanulo kun tro rapida korbataado povas regule malrapidigi la korbataadon. Kiam la koro batas tro malrapide, akupunkturo al samaj punktoj povas rapidigi iom post iom la korbatojn. En kuracado de kormalsano, tia efiko helpas reduktion de la kora troŝarĝo, povas altigi koran pulson kaj akceli resaniĝon de malsanulo. Enpiki en la punkton *zusanli* kaj aliajn povas fortigi rektuman peristalton por kuraci konstipon kaj ankaŭ malfortigi peristalton de la rektumo kaj dika intesto por kuraci lakson. La reguliga efiko de akupunkturo estas konstatabla en kuracado de malsanoj de sistemoj digesta, spira, sangocirkula, urina, nerva kaj endokrina.

Multaj faktoj pruvis, ke akupunkturo povas kuraci malsanojn pro tio, ke pingla pikado povas altigi imunecon de homa korpo. Ekz., se oni enpikas en la punkton *zusanli* de kuniklo por 10 ĝis 15 minutoj, la totala nombro de ĝiaj leŭkocitoj pliiĝas je ĉ. 40%, kaj 2-3-hora pikado povas kreskigi la totalan nombron de ĝiaj neŭtraj leŭkocitoj je 60%. Post enpikado de la punktoj *zusanli* kaj *hegu* la kapablo de leŭkocitoj por engluti orajn stafilokokojn leviĝis de 48.16% al 71.25%.

Laŭ klinika kaj laboratoria observado, akupunkturo povas forigi doloron eble pro tio, ke la pingla pikado produktas sendolorigan substancon. Oni kunligis sangajn angiojn de du hundoj kaj faris al unu akupunkturajn anestezon kaj al la alia operacion, tiam la lasta ne sentis doloron. Malligite, tiu ĉi reakiris normalan senton.

* La aŭtoro estas vicesploristo de la Ĉinmedicina Instituto kaj estro de la redakcio de la revuo "Akupunkturo kaj Mokso de Ĉinio".

LA PLEJ FRUAJ AKUPUNKTURO KAJ MOKSO KAJ ILIA NOVA DISVOLVIĜO

de ŬANG BENŜJAN

LONGA HISTORIO


En la ĉina popolo cirkulas jena rakonto: En la periodo de Prin-tempo kaj Aŭtuno antaŭ pli ol 2 500 jaroj estis regno Gŭo. Ĝia kronprinco suferis apopleksion. Ĝuste kiam la ĉirkaŭaj homoj ne havis rimedon por helpi, la fama kuracisto Bjan Ĉjue alvenis. Post diagnozo li faris akupunkturaron al korpaj punktoj de la princo. Post tio la princo estis resanigita. Tiu rakonto troviĝas en la ĉina historia verko "Kroniko" de Sima Ĉjan.

La rakonto montris la longan historion kaj grandan rolon de akupunkturo kaj mokso. Arkeologia prifosado kaj literatura esplorado montris, ke la akupunktura kaj moksa terapioj devenis de la primitiva epoko de Ĉinio kaj la akupunktura terapio burĝonis en la ŝtona epoko de Ĉinio antaŭ 10 000 jaroj. Primitivaj pikiloj estis malgrandaj artefaritaj ŝtonaj pingloj en formo de konuso. Oni frapis korpan surfacon per tia pinglo kaj pikis sangan angion, ke ĝi sanguo, aŭ haŭton por dreni absceson. Poste, kun la progreso de la homa civilizacio, aperis bambuaj, ceramikaj kaj diversaj metalaj pingloj. En 1972 ĉinaj arkeologiaj laborantoj trovis kvar orajn kaj kvin arĝentajn kuracajn pinglojn en reĝa tombo en Manĉeng-gubernio de Hebej-provinco antaŭ 2 000 jaroj. La pingloj forme similas al tiuj priskribitaj en historiaj libroj.

Mokso aperis frue, t.e. post kiam la homaro ekuzis fajron. Kiam oni suferis reŭmatalgion aŭ similan malsanon kaj timis malvarmon, li instinkte proksimigis la malsanan korpoparton al fajro. Hazarde brulvundite, oni iom saniĝis aŭ eĉ tute resaniĝis, tiel kreiĝis mokso. Arkeologiaj materialoj montras, ke en Ĉinio oni komencis uzi fajron antaŭ 500 000 jaroj. El tio oni povas vidi, ke la invento de mokso trapasis longan periodon.

En Tang-dinastio en la 7-a jarcento akupunkturo kaj mokso jam fariĝis apartaj terapioj. En la tiama imperiestra hospitalo estis medicinaj majstroj, medicinaj doktoroj kaj kuracistoj kaj ankaŭ akupunkturaj majstroj, akupunkturaj doktoroj kaj akupunkturistoj. La registaro de la Norda Song-dinastio (960—1127) faris kuprajn modelojn de homa korpo en grandeco de vera homo por ekzameni akupunkturistojn. Sur la kupra homo troviĝis ĉ. 700 korpaj punktoj, la korpo estis plena de akvo kaj ŝmirita per parafina vakso, kaj oni ne povis vidi la punktojn de ekstere. Kiam ekzamenito ĝuste pikis korpan punkton, akvo elŝprucis.

Tia ekzameno kaj ekzamena instrumento hodiaŭ ankoraŭ havas praktikan signifon. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio oni faris nombron da vitraj modeloj de homa korpo pli




Kupra homo kun akupunkturaj punktoj


grandaj ol vera homo, speciale por akupunktura instruado. Ili indikis korpajn punktojn per elektra lumo kaj sono.

ĜOJINDA DISVOLVIĜO

Hodiaŭ, surbaze de la akupunktura kaj moksa terapioj de la antikva Ĉinio, disvolviĝas nova medicina branĉo de akupunkturo kaj mokso, esploranta la funkcion, teorion, klinikajn prognozon kaj kuracon per akupunkturo kaj mokso kaj akupunkturaran



Modernaj akupunkturaj instrumentoj



Moksaj instrumentoj

anestezon. Ĝi akcelas disvolviĝon de la akupunktura kaj moksa terapioj.

Rilate ĝian klinikan esploron en Ĉinio, en la lastaj kvin jaroj la akupunktura kaj moksa terapioj ricevis diversajn efikojn en kuracado de pli ol 300 specoj de oftaj malsanoj kaj certan efikon en kuracado de malfacile kuraceblaj kaj akutaj malsanoj. Ekz., la efiko en kuracado de akuta virusa hepatito estis altigita de 80% al 90%; la efiko en kuracado de akuta bakteria disenterio ĝenerale atingis 80%; kaj la efiko de mokso al la korpopunkto *gūanjūan* por venki sango-perdan ŝokon atingis 73%. En la lastaj jaroj oni aplikis akupunkturaron kaj mokson en kuracado de kirurgiaj malsanoj, kiaj akuta simpla apendicito, akuta intesta tordiĝo, akuta kolecistito kaj kola limfonodito, kaj jam ricevis diversajn efikojn.

La progreso de akupunkturo kaj mokso en klinikaj aplikado kaj esplorado montriĝis en kuracado de malsanoj kontraŭaj, spirorganaj, neŭromensaj, ortopediaj, haŭtaj, ginekologiaj, pediatria kaj otorinolaringologiaj.

La esplorado kaj aplikado de akupunktura anestezo estas tre atento-altiraj.

Antaŭ pli ol 2 000 jaroj la ĉinmedicina libro "Nej Ĝing" jam

havis klaran noton pri kvietigo de doloro per akupunkturo. En la fino de la kvindekaj jaroj ĉinaj medicinaj laborantoj sukcese fortranĉis tonsilon, aplikante akupunkturaron anestezon, surbaze de riĉa sperto pri akupunktura sendolorigo. Post tio iom post iom multiĝis la malsano-specoj operacie traktataj per akupunktura anestezo. Nun tiel kuracataj malsanoj jam atingis pli ol cent specojn, el kiuj pli ol 30 estas ofte traktataj. La totala nombro de la malsanaj kazoj superis du milionojn. En la komenca periodo de akupunktura anestezo oni bezonis enpiki dekojn da pingloj, sed nun nur kelkaj pingloj jam sufiĉas. Ekz., post enpiko de unu pinglo en la akupunkturaron punkton

sanjanglūo, oni povas fortranĉi pulmon. Nun kuracistoj aplikas ankaŭ sintezan anestezon por fari operacion. Ekz., aplikante elektran akupunkturaron al pulma ektomio, oni uzas ankaŭ iom da kvietiga drogo. Tio povas altigi la anestezan efikon.

Nun oni aplikas akupunkturaron anestezon ofte al operacioj de encefalo, okulo, orelo, nazo, laringo, torako kaj abdomeno, al ginekologio, ortopedio, akcelita akuŝo, tiroida ektomio kaj dentoeltiro.

La akupunktura anestezo en operacio havas jenan avantaĝon: Ĝi ne estigas tiajn akcidenton kaj malbonan efikon kiel en operacio, en kiu oni aplikas anestezon

Notoj pri akupunkturo en antikva medicina verko



non. Laŭ statistiko, en lando kun 60 000 000 loĝantoj, ĉiujare 2 000 homoj mortis de operacio per anesteziado. Dum akupunktura anesteziado la operaciato havas klaran menson, kio povas altiĝi la precizecon de operacio. Ekz., dank' al konscia kunago de operaciato en akupunktura anesteziado kuracisto povas fari al li pli precizan strabotomion. Krome, akupunkturo rapidigas resaniĝon de la operaciato. Ĉar akupunktura anesteziado malmulte perturbas la homan organismon, tial operaciato havas normalajn sango-cirkuladon kaj koran funkcion, malmulte sangas kaj infektiĝas dum operacio kaj povas preni manĝaĵon baldaŭ post la operacio. Paciento operaciita per akupunktura anesteziado resaniĝas pli frue je 3-5 tagoj ol tiu per anesteziado. Akupunktura anesteziado estas simpla kaj facile akceptebla por paciento. Multaj pacientoj operaciitaj per akupunktura anesteziado ofte por la duafoja operacio petas akupunkturan anesteziadon.

La nova disvolviĝo de la moderna akupunktura kaj moksa

arto speguliĝas ankaŭ en la terapioj de elektronika varmiga mokso kaj lasera, mikroonda, son-elektronda, SSP-elektra kaj Voll-elektra akupunkturoj. La terapio de lasera akupunkturo karakteriziĝas per tio, ke laserradioj tra fotokondukta fibro efikas sur korpan punkton, anstataŭigante la tradiciajn akupunkturon kaj mokson per biologia funkcio de lasero. Ĝia avantaĝo estas ne kaŭzi doloron, tial ĝi taŭgas precipe por torakaj operacioj aŭ tiuj al infanoj. Ĉar la longaj radioj de lasera akupunkturo estas absolute sterilaj, ĝi ne kaŭzas traŭmaton kaj infekton. Kaj krome, ĝia manipulado estas facila.

La lasera akupunkturo bone efikas sur multajn malsanojn, kiaj malsanoj internaj, kirurgiaj, ginekologiaj, pediatria, haŭtaj kaj otorinolaringologiaj.

La aparato de mikroonda akupunkturo estis farita de radioricevila fabriko de Ĝjansu-provinco. En 1984 DBJ-1-tipa aparato de mikroonda akupunkturo akiris por la fabriko oran medalon en la 40-a Plovdiv-a Aŭtuna Internacia Mekanika Foiro en Bulgario.

La aparato de mikroonda akupunkturo estis projektita en kombino de la moderna mikroonda tekniko kaj la tradicia akupunktura teorio. Ĝi povas forigi malvarmon kaj spasmon, akceli la sangon cirkuladon kaj malstreĉi muskolojn kaj tendenojn. Ĝi efike kuracas pli ol 20 malsanojn, kiaj koronaria kormalsano, reŭmatalgio, tordiĝo, diversaj artritoj kaj dismenoreo. Ĝi povas resanigi 90% de la kuracatoj, tial ĝi estas esperiga por akupunktura terapio.

Nun studo de akupunkturo kaj mokso eniris en prosperan epokon de diversaj skoloj. Multaj ĉinaj medicinistoj havas komunan opinion pri tiu medicina branĉo kaj ankaŭ sian propran vidpunkton kaj eĉ iel disvolvis ĝin. Ankaŭ en aliaj landoj aperis kelkaj skoloj. Ekz., en Japanio ekzistas pluraj skoloj kaj FR Germanio, Sovetunio, Pollando havas sian skolon. Oni esperas, ke tiu medicina branĉo leviĝos al pli alta nivelo kaj faros pli multan kontribuon al la monda medicino.

Akupunkturaj kaj moksaĵ instrumentoj



Antikva akupunkturo



AKUPUNKTURO KAJ MOKSO SERVAS AL LA HOMARO

MEDICINA BRANĈO ĜENERALE AGNOSKITA EN LA MONDO

En 1980 la Monda Sana Organizo de UNO prezentis, laŭ la

opinioj de la kunsido pri akupunkturo, mokso kaj akupunktura anestezo kunvokita en Pekino en junio 1979, konkretan proponon pri disvolvo de la akupunktura kaj moksa laboroj, ke


de ŬANG BENŜJAN

diverslandaj registaroj anoncu politikon, tra registara kaj leĝofara procedo, subteni kaj disvolvi akupunkturon, mokson kaj akupunkturan anestezon. Tio montris, ke akupunkturo kaj mokso jam estas medicina branĉo ĝenerale agnoskita ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la tuta mondo.

Akupunkturo kaj mokso ŝuldis sian nunan pozicion en la monda medicino al siaj simpleco, oportuneco, malkara kosto, bona efiko kaj neesto de flanka efiko. Iliaj superecoj tiris multajn homojn al vasta esplorado kaj aplikado de la akupunktura kaj moksa terapioj.

Laŭ statistiko, Japanio nun havas pli ol 20 akupunkturajn kaj moksajn kolegiojn kaj unu tian altlernejon, pli ol 50 000 akupunkturistojn kaj moksistojn, sep fakajn revuojn kaj ankaŭ landan akupunkturan kaj moksan instituton kaj asocion de akupunkturistoj kaj moksistoj.

Historia literaturo diras, ke la plej frua tempo pri enkonduko de akupunkturo kaj mokso en Japanion estis Suj-dinastio (581 — 618 p. K.). Tiam ĉina bonzo Ĝicong veturis al Japanio, kunportante libron pri akupunkturo kaj mokso kaj aliajn librojn pri ĉinaj medicino kaj medikamentoj. Tiel Japanio ekhavis terapiojn de akupunkturo kaj mokso. En 608 p. K. Japanio sendis homojn al Ĉinio por lerni akupunkturon kaj



Ĉinaj akupunkturistoj en Ĉilio

La Pekina Internacia Akupunktura Kurso



Heroa kaj Ĉarma “Legendo pri Mulan”

Fotoj de CAJ HŪANGCJU



Mulan en virina vesto

EN pompa palaco imperiestro faras aŭdiencon al la korteganoj. Pro la brilaj militmeritoj, la imperiestro ordonas premii junan generalon Mulan per raraj trezoroj kaj nomumi tiun altrangulo, tamen tiu fordankis. La imperiestro miras, kaj fine decidas edzinigi sian filinon al Mulan. Tiam

Mulan senparole demetas sian kaskon: Antaŭ la korteganoj aperas ja junulino kun longaj haroj, kio mirigis ĉiujn ĉeestantojn. . .

Jen sceno el sep-akta baletto “Legendo pri Mulan” prezentita de la Ŝanhaja Opera-Baleta Ensem-

mokson, kaj tiuj studis 15 jarojn. En 702 Japanio difinis lernotempon por sep jaroj por kulturprofesiajn akupunkturistojn kaj moksistojn. En la tiama japana mikada palaco estis medicina majstro, medicina doktoro kaj kuracistoj kaj ankaŭ akupunktura majstro, akupunktura doktoro kaj akupunkturistoj.

La ĉinaj akupunkturo kaj mokso estis enkondukitaj en Francion, Nederlandon, Germanion, Brition kaj Italion en la 16-17-a jc., en Rusion en la 18-a kaj en Usonon en la 19-a.

Poste, kun sia disvolviĝo akupunkturo kaj mokso havis ĉiam pli grandan influon en la mondo. Precipe en 1972, kiam la ĉina registaro anoncis la sukceson de

akupunktura anestezo, leviĝis en la mondo fervoro por akupunkturo kaj mokso. Post 1975, laŭ la peto de la Monda Sana Organizo, Ĉinio establis internacian trejnan centron de akupunkturo kaj mokso respektive en Pekino, Ŝanhajo kaj Nankino. En la lastaj jaroj medicinistoj de pli ol cent landoj kaj regionoj sinsekve venis al Ĉinio por lerni akupunkturon kaj mokson. Pollando, Aŭstralio, Argentino kaj Ĉilio invitis ĉinajn akupunkturajn kaj moksajn specialistojn funkciigi tiuspecan kurson.

Nun pli ol 120 landoj aplikas terapiojn de akupunkturo kaj mokso. El ili pli ol 30 jam faris akupunkturan anestezon en operacio.

FONDIĜO DE INTERNACIAJ ESPLORAJ ORGANIZOJ DE AKUPUNKTURO KAJ MOKSO

Ĉar akupunkturo kaj mokso aplikiĝas pli kaj pli vaste en la mondo, multaj landoj fondis sian esploran organizon de akupunkturo kaj mokso. Inter ili estas Japanio, Usono, Francio, Britio, Germanio, Italio, Svislando, Aŭstrio, Sovetunio, Pollando, Rumanio, Bulgario, Kanado, Pakistano, Hindio, Aŭstralio, Novzelando, Jugoslavio, Argentino kaj Ĉilio.

Krome, la bezono de disvolviĝo de akademia interŝanĝo de akupunkturo kaj mokso akcelis fondiĝon de internaciaj organizoj de akupunkturo kaj mokso. Inter ili grandaj estas la Internacia Akupunkturista Asocio (Daŭrigo sur p. 39)

blo. "Legendo pri Mulan" sukcese surscenigis la popularan poemon "Mulan" en la formo de baletto.

La baletto estas bazita sur la folkloro poemo "Mulan" aperinta en la periodo de Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420 — 589 p. K.). La poemo priskribas la historion de knabino Mulan: En la kriza momento, kiam agresantoj enstrudiĝis, la patrolando alfrontis danĝeron de pereado kaj rekvizicioj venis senĉese unu post alia, ŝi ne povis sidi plu ĉe teksilo kaj decidis tuj alivesti sin vira kaj militistiĝi anstataŭ sia patro, ĉar ŝia patro ne havas plenaĝan filon, ŝi nek pliaĝan fraton. Ŝi militis dek du jarojn kaj akiris brilajn militmeritojn. Fine ŝi revenis triumfe hejmen en origina aspekto. Ĉinoj prenas Mulan kiel simbolon de saĝo, kuraĝo, honesteco kaj nobleco. Influate de la folkloro poemo aperis multaj bravaj virinaj trupoj kaj Mulan-tipaj heroinoj en la historio de la ĉina nacio.

Pro forta legendeco de la temo, la figuro de Mulan longtempe viglas sur la scenejoj de diversaj lokaj operoj, sed estas la unua fojo en Ĉinio, ke oni prezentas ĝin en baletto. Pro tio la koreografoj faris penigan esploron. Ili vizitis tri grandajn ŝtonajn kavernojn de Dunhŭang, Jungang kaj Longmen, elterigitajn terakotajn militistojn kaj ĉevalojn en Ŝjian kaj antikvajn batalkampojn, por inspiriĝi el la antikvaj artoj. Ili kreis la figuron de Mulan kun nobla animo, emfazante ŝian amon al la popolo, patro kaj kunbatalantoj, kaj per korifea, sola kaj duopa danco kaj malfacilegaj dancmovoj reliefigis Mulan, heroinon bravan, mildan, saĝan kaj amindan, kaj ne sekan figuron scipovantan nur militi.

La Ŝanhaja Opera-Baletta Ensemblo ĉiam celas krei ĉinstilan nacian baletton. En la finaj kvindekaj jaroj ili verkis kaj surscenigis "Magia Lotusa Lanterno", kiu priskribas la amon de paro da gejunuloj, kaj "Societo de Glaveto" kiu priskribas kamparanan ribelon. Ili ricevis varman laŭdon de spektatoroj. "Legendo pri Mulan" estas alia praktiko post ili. Ĝiaj danco, muziko, dekoracio kaj kostumo montras ilian penigan strebado al la nacia stilo. La materialo de la dancoj estis elĉerpita el la dancoj de la ĉinaj klasikaj operoj kaj naciaj folkloraj dancoj, kiel realisma kaj stabila tibeta soldanco, rapida kaj brava mongola luktodanco, vigla kaj serena ujugura kvaropa danco, gaja kaj varma danco kun sonoriletoj ĉe talio, kurioza danco de fajrbova formacio k.a. Tiuj ĉi dancoj, tute malsamaj en stiloj, elmontras buntajn naciajn gustojn. En traktado de la muzikaĵoj la

koreografoj emfazas la trajtojn de antikvaj kaj simplaj melodioj de nordokcidenta Ĉinio kaj la rolojn de *banhu*, *bangzi*, *sŭona* kaj aliaj naciaj muzikiloj. Simplaj, elegantaj kaj ĉarmaj estas la kostumoj kaj dekoracioj, kiujn oni projektis referencinte la freskojn kaj skulptaĵojn de post la Norda Ŭejdinastio (386 — 534 p.K.).


Gu Hong, rolulo de Mulan, estas nova stelulino. Ŝi, 17-jara, debutis sukcese sur scenejo. Kaj en la lastaj ses jaroj ŝia arto maturiĝis. Ŝi prenis ĉefajn rolojn en la baletto "Al la Luno", adaptiĝinta el bela amlegendo, la historia mita baletto "Feniksoj Ekkantas sur la Monto Ĉiŝan", kiu rakontas pri iu prahistoria justa milito, kaj aliaj balettoj. Ŝia danco karakteriziĝas per liberaj, elegantaj kaj delikataj movoj. Ŝi lertas en ludo de lirika rolo.

Gu Hong estas svelta knabino introvertita. Ĉi-foje ludi rolon de la brava Mulan estas tre malfacile por ŝi. Ankaŭ la reĝisoro havis timon pri tio. Por pli bone prezenti la rolon Mulan, Gu Hong lernis ankaŭ koncernajn movojn de gimnastiko, ĉina luktarto kaj la pekina opero. Ŝi ofte estis trejnita kiel viro. Grandmova kaj ripetada provprezentado tro lacigis ŝian nefortan korpon, ke sur ŝiaj vangoj ofte ŝvito kunfluis kun larmoj. Spektatoroj varme aplaŭdas al Gu Hong, kiam ŝi staras per unu piedo sur ŝultro de aktoro kaj direktas la alian supren. Kiu scias, kiom da ŝvito tiu kelk-sekunda pozo postulis. Ĝoŭ Cajlong, rolulo de ĉevalisto de Mulan, havis sur sia ŝultro multajn sangstriojn kaŭzitaĵojn de ŝia mil-foja piedpremado. Tamen li persistis en provprezentado. La sindonemo de la kundancanto, la zorgo kaj kuraĝigo de la reĝisoro sukcesigis ŝin en modlado de la heroino kun du malsamaj trajtoj: unu origina Mulan, kvieta kaj bonkora knabino, la alia virkostuma, brava Mulan. Tio donas al la spektatoroj neforgeseblan impreson.


La baletto prezentiĝis en Ŝanhajo, Pekino kaj Tjanĝin. Kaj ĉiufoje la teatro estis plenplena de spektatoroj, el kiuj estis nemalmultaj fremdlandanoj, ekzemple la Filma Delegacio de Holivudo kaj amikoj el la japanaj teatraj rondoj. Ili tre ĝojis ke ili povis aprezi tiel belegan nacian baletton de Ĉinio. Ĝuste kiel iu recenzisto diris: "El la ĉinaj balettoj, laŭ estetika vidpunkto, ĉarmaj konsistigas plejmulton, grandiozaj malpli, kaj ĉarmaj kaj grandiozaj estas malmultaj. 'Legendo pri Mulan' apartenas al la lasta."



Mulan adiañas sian patron por iri al milito.



Mulan en batalo



Mulan vundita de sago

La kortego celebras la venkon.





En kuracado la virineco de Mulan malkovriĝis, kaj ŝi enamiĝis al juna generalo.

La imperiestro volas edzinigi sian filinon al Mulan, kaj tiam Mulan devas demeti sian militistan uniformon por vidigi sian virinecon.



MALFERMITAJ URBOJ

DALJAN, PORDO DE NORDORIENTA ĈINIO

de ĜENG ĜENGJE

Fotoj de LAŬ BAJ kaj ŜIN HŬA



Haveno en nokto



Placo en la urbocentro de Daljan

Ĉe maro



DALJAN estas grava industria urbo en nordorienta Ĉinio. La urbo situas ĉe la suda fino de Ljaŭdong-duoninsulo kaj havas 5 distriktojn kaj 5 guberniojn, kun totala areo de pli ol 12 500 kvadrataj kilometroj kaj pli ol 4.7 milionoj da loĝantoj.


Ĝia trafiko mara, tera kaj aera estas tre facila. Daljan estas la dua granda haveno de Ĉinio, tutjare sen aluvio kaj glacio. Ĝi estas ne nur importa-eksporta pordo de la tri nordorientaj provincoj kaj la orienta Interna Mongolio de Ĉinio, sed ankaŭ trafika centro por konduki al Azio, Eŭropo kaj Ameriko. Ĝi havas komercajn rilatojn kun pli ol 140 landoj kaj regionoj kaj ĉiujare akceptas pli ol 2 000 eksterlandajn varŝipojn kaj turismajn ŝipojn. La haveno posedas 48 ankrejojn, inter kiuj 23 povas ankri pli-ol-10 000-tonelajn ŝipojn. La jara ŝarĝ-malŝarĝa ka-

pablo de la haveno estas 35.85 milionoj da tunoj. La jara kvanto de importaj kaj eksportaj varoj kaj totala valoro de eksportaj varoj okupas la unuan lokon en Ĉinio respektive. La jara kvanto de eksporta nafto de la nove konstruita Daljan-Olehaveno konsistigas 90% de tiu de la tuta lando. En 1984 oni jam komencis konstrui karbokajon de Heŝang-insulo, kiu ĉiujare povos enŝipigi 5 milionojn da tunoj da karbo. Krome, post kiam oni konstruos novan havenon ĉe Dajau-golfo en la gubernio Ĝinŝjan de Daljan, la ŝarĝ-malŝarĝa kapablo de Daljan-haveno povos atingi cent milionojn da tunoj. Nun la haveno funkciigas sep navigajn liniojn kaj havas fervojon kondukanta al la grandaj urboj de nordorienta Ĉinio kaj la du municipoj Pekino kaj Tjanĝin. Oni planas konstrui Daljan en transigancion de internacia transporta-

do. Jam finiĝis la unua parto de la plivastiga konstruado de la internacia flughaveno Ĝoŝujzi, kiu povos esti uzata por pasaĝeraviadilo Boeing 747. Oni unue starigos aerlinion kondukanta al Hongkong kaj Japanio. Nun aviadiloj regule flugas de la urbo al Ŝenjang, Pekino, Ĉingdaŭ kaj Ŝanhajo. La 960-kanala mikroonda telekomunika linio inter la urboj Ŝenjang kaj Daljan ekfunkciis en 1984, kio havigis al la urbo kondiĉojn rekte telefoni al ĉiuj aliaj grandaj urboj de Ĉinio. Ankaŭ ĝia internacia komunikado estos plibonigita.

Daljan, kun bona industria bazo, havas pli ol 1 900 industriajn entreprenojn. Unu el ili estas la Daljan-a ŝipkonstruejo kun 100 000-tonela ŝiplito. Nun ĝi konstruas 65 000-tonelan oleŝipon. Antaŭ kelkaj jaroj la ŝipkonstruejo importis eksterlandan avangardan teknologion, kaj

La Daljan-a Fabriko de Pezaj Maŝinoj, en kunlaboro kun Japanio, produktas ŝarĝajn maŝinojn por havena uzo.





Daljan

tial ĝi povas produkti grand-ĉevalpovan porŝipan dizelon kun internacia nivelo. Tio metis finon al la historio de la konstruado, ke ĝi povis konstrui nur ŝipkorpon kaj ne ŝipmotoron. Post tio ĝi produktis la unuan 17 280-ĉevalpovan porŝipan dizelon, kio pretigis al Ĉinio kapablon konstrui ĉefan motoron de 100 000-tonela ŝipo. La aliaj grandaj entreprenoj estas la Daljan-a Lokomotiva Fabriko, kiu produktas grand-ĉevalpovajn dizel-lokomotivojn; la Daljan-a Kemi-industria Kompanio, kies produktokvanto de kaŭstika sodo konsistigas 40% de tiu de la tuta lando; kaj la entreprenoj de fero kaj ŝtalo, petrolo, lagroj, tekstilaĵoj, ilmaŝinoj, neferaj metaloj, aŭtobusoj, generatoroj, karbo, elektro, konstru-materialoj, ligna prilaborado, paperfarado, sukerfarado kaj aliaj. La industria produktov valoro de Daljan en 1983 atingis 8.43 miliardojn da jŭanoj. 91 specoj de produktaĵoj kaj konstruoj en la lastaj tri jaroj estis premiitaj de la ŝtato per oraj kaj arĝentaj medaloj, 156 specoj de produktaĵoj estis elektitaj de la ŝtato kaj la provinco kiel bonkvalitaj.

Daljan estas riĉa je agrikulturaĵoj, fiŝoj kaj fruktoj. Tie produktiĝas pli ol 100 specoj de pomoj, inter kiuj la plej bona estas la

pom-speco Gŭogŭang. Ĝia jara produktokvanto de pomoj konsistigas seponon de tiu de la tuta lando, tial ĝi estas unu el la ĉefaj pom-eksportaj bazoj de Ĉinio. En la maro ĉe Daljan vivas ĉ. 100 specoj de fiŝoj, kaj la jara produktokvanto de marproduktaĵoj konsistigas dekonon de tiu de la tuta lando. Salikokoj, speciala marproduktaĵo de Daljan, ĉiujare eksportiĝas eksterlanden en granda kvanto. Daljan havas multajn marmalprofundaĵojn kun temperaturo plej taŭga por bredi moluskojn. La tieaj holoturioj, pektenoj, mituloj ktp estas bone akceptataj de la internacia merkato. Ĝia tekniko de kulturado de laminario kaj bredado de mituloj kaj aliaj marestaĵoj estas supera en Ĉinio.


Daljan estas ankaŭ pitoreska urbo. Ĝi okcidente bordas Bohajmaron kaj oriente la Flavan Maron, kun zigzaga marbordo longa ĉ. 900 kilometrojn. Ĝi havas diversformajn insulojn kaj groteskajn rifojn. Tie la lazuraj ĉielo kaj maro, delikataj sablo kaj rifoj formas ĉarman pejzaĝon. En la urbo sterniĝas puraj kaj bonordaj stratoj ombrataj de arboj. La konstruaĵoj de la urbo estas malsamaj en arkitektura stilo. Ĉiusomere turistoj venas tien unuj post aliaj por somerumi kaj sin bani ĉe la marbordaj banejoj.

Daljan estas malfermita urbo. Nun ĝi estas plena je prospereco. Kiel havenurbo kaj malnova industria bazloko, ĝi havas multajn favorajn kondiĉojn por utiligi eksterlandajn kapitalojn, enkonduki teknikojn, akceli disvolvon de ekonomio kaj konstruadon de landinternaj lokoj. Per tio ĝi altiras al si eksterlandajn komercistojn. Multaj landoj sendis siajn reprezentantojn al Daljan por trakti ekonomian kunlaboron. De la jaro 1979 ĝis nun la urbo enkondukis pli ol 330 konstruajn projektojn kaj importis pli ol 7 000 kompletojn da instalaĵoj. Interalie 172 projektoj estas entreprenataj en la formoj de kompensa negoco, prilaborado kaj muntado, komuna produktado, luigo kaj pruntedonado por utiligi eksterlandajn kapitalojn. Kunlaborajn rilatojn kun ĝi havas Japanio, FR Germanio, Usono, Svislando, Britio, Italio, Francio, Kanado, Nederlando, Aŭstrio, DR Germanio, Hongkong kaj Aŭmen.

Samtempe kun tio, la ŝtato sankciis, ke ĝi estu regiono ekspluatota en ekonomio kaj tekniko, kio ebligas al ĝi iri al nova etapo en la politiko malferma al la eksterlando.



La nova ekonomia kaj teknika regiono, kiun Daljan planas konstrui, troviĝas en Ĝinŝjan-gubernio 33 kilometrojn for de la urbocentro de Daljan. La unue konstruota parto de la regiono kovras areon de 3 kvadrataj kilometroj, kaj la tuta planita areo atingos 20 kvadratajn kilometrojn. Nun la ĝenerala projekto de la ekspluatota regiono jam estas ellaborita. La urbo jam donis al pli ol 230 projektoj difinitan areon por konstruo. La vojoj, akvo-provizaj kaj akvo-drena sistemoj kaj aliaj bazaj instalaĵoj de la regiono estis ekkonstruitaj en oktobro 1984. En la regiono konstruiĝos nombro da industriaj entreprenoj de elektroniko, mezuraj aparatoj, precizaj maŝinoj, novaj materialoj, delikataj kemiaĵoj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Tiuj entreprenoj malmulte konsumas energion, ne kaŭzas polucion kaj bezonas multe da teknikoj. Tie fondiĝos ankaŭ scienc-teknikaj ekspluatataj institucioj. Daljan fariĝos transiga stacio de la internacia komerco kaj malfermita regiono por utiligi eksterlandajn kapitalojn, enkonduki avangardajn teknikojn kaj administran sperton. Ĝi ne nur antaŭenpuŝos prosperiĝon de la urbo mem, sed ankaŭ servos al progresado de tekniko kaj ekonomio de la internaj lokoj en la tuta nordorienta Ĉinio kaj la orienta Interna Mongolio.



Nova kajo por konteneroj



Mozaiko el konkaj pecoj farita de Daljan



RETROSPEKTIVE KAJ PERSPEKTIVE

—Pri la 3-a Ĉina Laborkunveno de Esperanto



Inaŭguro de la Tria Tutlanda Labor-kunveno de Esperanto

EN la bona situacio, ke la Esperanto-movado vige disvolviĝas en diversaj lokoj de Ĉinio kaj la ĉinaj esperantistoj kun plena memfido renkontas la 71-an Universalan Kongreson de Esperanto, la 29-an de aŭgusto, 1984, inaŭguriĝis la nomita kunveno, kiu daŭris kvin tagojn. La kunveno malfermis la 88-jara Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. La inaŭguron ĉeestis ankaŭ Ĉu Tunan, membro

de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso, vicedro de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun fremdaj Landoj kaj prezidanto de la societo Amikoj de Esperanto, Hu Ŝeng, Ĵelezo, Ĉen Ĵuan, Ge Baŭĉĵuan, Liŭ Ŝjiljang kaj aliaj famaj personoj de diversaj rondoj.

En sia malferma parolo Hujucz diris: “La 3-a Ĉina Laborkunveno de Esperanto estas tre grava, ĉar okazis grandaj progresoj de nia lingvo en Ĉinio. La kunveno devas diskuti la venontajn problemojn de nia movado. Ni esperantistoj de Ĉinio devas

unuiĝi kaj progresigi nian aferon en la tuta lando.” En siaj paroloj Ĉu Tunan kaj Hu Ŝeng montris, ke Esperanto estas lingvo promesplena kaj indas pluan propagandon kaj disvastigon, kaj esperis, ke la ĉinaj esperantistoj diligente lernos kaj pene laboros por bone sukcesigi la 71-an Universalan Kongreson de Esperanto. Ge Baŭĉĵuan kaj Liŭ Ŝjiljang esprimis, ke la Pekina Esperanto-Asocio kaj Radio Pekino pretas fari kontribuojn al sukcesigo de la 71-a UK.

En la kunveno partoprenis 63 reprezentantoj el diversaj lokoj

de Ĉinio. Inter ili estas pioniroj de la ĉina Esperanto-movado, veteranaĵoj esperantistoj, kiuj longe laboras por Esperanto, mezaĝaj esperantistoj — la ĉefaj fortoj de la ĉina movado kaj ankaŭ junaj esperantistoj bakitaj en la lastaj jaroj. Ke la kvar generacioj de ĉinaj esperantistoj ĝoje kolektiĝis, tio markis la prosperiĝon de la movado en Ĉinio.

En la kunveno vicĉefsekretario de ĈEL Li Najŝi raportis pri la disvolviĝo de la enlanda movado dum la kvin jaroj post la 2-a Ĉina Laborkunveno en 1979. Ĝenerala sekretario de ĈEL Ĝang Ĉji-ĉeng raportis pri la 69-a Universala Kongreso de Esperanto kaj alvokis, ke la Esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj de ĉiuj lokoj unuanime kaj tuforte faru sian kontribuon al sukcesigo de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Ĉinio.

La kunvenantoj tre ĝojis havi la ŝancon resumi la enlandan movadon, interŝanĝi spertojn kaj lerni unu de alia en Pekino. Ili konstatis, ke la situacio, en kiu nun troviĝas la ĉina Esperanto-movado, estas senprecedence bona kaj vere kuraĝiga.

Dank' al siaj rimarkindaj plibonigoj en la enhavo, formo kaj stilo, la gazeto El Popola Ĉinio kaj la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino estas laŭdataj de esperantistoj de diversaj landoj kaj fariĝis al ili fenestro por koni la novan Ĉinion. Tio montras la utilecon de Esperanto kiel komunikilo en la internaciaj kontaktoj.

En la lastaj kvin jaroj oni jam fondis 15 provinc-nivelajn Esperanto-asociojn, kaj la esperantistoj en aliaj ses provincoj preparas sin por establi sian asocion.

ĈEL reldonas la tradician Esperantan gazeton "La Mondo", kiu havis grandan influon en la



La 88-jara Hujucz ĉeestas la inaŭguron.

tridekaj jaroj kaj nun fariĝis bona amiko de esperantistoj kaj komencantoj en lernado de la lingvo. Nun la gazeto havas proksimume kvardek mil legantojn. Ankaŭ asocioj de diversaj lokoj eldonas multajn Esperanto-gazetojn (plejparte mimeografitajn), por liveri legaĵojn al Esperanto-lernantoj.

Kun aprobo de la Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko ĈEL funkciigis tri plentempajn instruistajn Esperanto-kursojn dum tri sinsekvaj jaroj kaj elkulturis nombron da movadaj aktivuloj por diversaj lokoj, kaj nun iras la kvara.

Oni ankaŭ fondis diversformajn Esperanto-kursojn, inkluzive korespondajn kaj pergazetajn. Laŭ nekompleta statistiko, nun troviĝas ĉirkaŭ 150 000 Esperanto-lernantoj tra la tuta Ĉinio.

Dum la kvin jaroj ni vaste diskonigis Esperanton kaj la movadon al la publiko pere de diversaj amaskomunikiloj kaj havigis al ni pli multe da amikoj kaj simpatiantoj de Esperanto. Ĉi-riilate

bone ekzemplas la fondiĝo de la societo Amikoj de Esperanto en la fino de 1981, kiu konsistas el famaj personoj de diversaj rondoj de Ĉinio.

La supre menciitaj faktoj montras, ke la ĉina Esperanto-movado havas jam certan solidan bazon, kiu nemankigeblas por la estonta evoluo de la movado en Ĉinio.

Se temas pri la praktikaj spertoj kiujn la ĉinaj esperantistoj akumulis, la subaj estas komunaj: unue nepre necesas gajni subtenon de koncernaj registaraj instancoj; due necesas nombro da fervoraj kaj sindonemaj esperantistoj kun kapabloj organizaj aŭ lingvaj; kaj trie necesas havi propran Esperanto-organizaĵon. Kun tiuj tri kondiĉoj la movado ja povas disvolviĝi eĉ de nulo.

Multaj kunvenantoj akcentis, ke dum diskonigo de Esperanto ni devas esti realistoj, kaj ke troigo de la praktika valoro de Esperanto estas malkonsilinda, ĉar alie ni iros al la malo. La idealo kaj realo estas dialektike unuecaj. Por disvastigi Esperanton kaj re-



Cu Tunan parolas ĉe la inaŭguro.

aligi la idealon, kiun Esperanto portas en si, ni nepre devas labori solide kaj senlace.

La kunvenantoj opiniis, ke la 71-a UK okazonta en Pekino antaŭ la centjara jubileo de Esperanto donos profundan influon ne nur al la ĉina Esperanto-movado, sed ankaŭ al la monda Esperanto-movado, precipe al tiu en landoj de la tria mondo. Ĝi estos UK okazonta unufoje en Ĉinio. La tasko estas glora kaj peniga. La ĉinaj esperantistoj nepre devas sukcesigi la 71-an UK.

La partoprenantoj prezentis multajn tre brilajn proponojn rilate la 71-an UK kaj la estontan evoluon de la movado en Ĉinio. Ili unuanime opiniis, ke dum la venontaj jaroj la gravita punkto de la ĉina Esperanto-movado devas plenforte altigi la kvalitojn organizan, instruan kaj propagandan kaj la lingvan nivelon de ĉinaj esperantistoj. Zamenhof iam diris: "Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian fami-

lian lingvon heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj." (El Originala Verkaro, p. 323. letero de 1901-05-28 al Kofman) La vortoj de Zamenhof montris, ke por la estonteco de Esperanto pli gravas kvalito ol kvanto. Estas sendube, ke nur kun alta kvalito la ĉina Esperanto-movado povos disvolviĝi antaŭen kaj profunden.

La kunvenantoj emfazis, ke kompare kun iuj landoj kun evoluinta Esperanto-movado, la lingva nivelo de ĉinaj esperantistoj estas nealta, des pli malalta estas la parola nivelo. Tial, la plej urĝa tasko estas altigi la lingvan nivelon, precipe la parolan nivelon. Diverslokaj Esperanto-organizaĵoj devas alpreni efikajn rimedojn por sisteme kaj severe trejni fervorajn kaj dediĉemajn esperantistojn kun bazaj scioj de la lingvo por garantii sukcesigon de la 71-a UK.

Dum la kunveno multaj partoprenantoj proponis okazigi en oportuna tempo en 1985 la 1-an

landan kongreson de Esperanto, "UK-similan", por plue antaŭenigi la ĉinan movadon kaj akiri organizan sperton. Post diskutado, la Konstanta Komitato de ĈEL decidis okazigi la 1-an landan kongreson en la lasta tagdeko de la venonta aŭgusto. La Esperanto-Asocio de Junnan-provinco esprimis sian deziron esti gastiganto de la 1-a landa kongreso en ĝia ĉefurbo Kunming.

Antaŭ la fino de la kunveno, komisiite de Hujucz, vicprezidanto de ĈEL Ĉen Jŭan faris gravan resuman paroladon, plupaŝe eksplikante, kiel antaŭenigi la movadon en Ĉinio kaj fari preparajn laborojn por la 71-a UK. Lia edifa parolado vekis grandan intereson ĉe la kunvenantoj.

Je la fino, ĝenerala sekretario de ĈEL Ĝang Ĉjiĉeng esperis, ke post la hejmen-reveno la reprezentantoj de diversaj lokoj solide laboros por renkonti la du kongresojn. En la nomo de ĈEL li premiis la Esperanto-Asocion de Ĉongĉing de Siĉŭan-provinco, Ĉinio, pro ĝiaj atingoj en propagando, disvastigo kaj instruado de Esperanto en la lastaj jaroj, per Trofeo Fyne, kiun la estraro de UEA aljuĝis al la Ĉina Esperanto-Ligo en 1983.

La ĉeestantoj opiniis, ke la laborkunveno estas sukcesa kaj tre utila. Ĉe la adiaŭo, la reprezentantoj de diversaj lokoj promesis revidi unu alian kun novaj atingoj de la movado en Kunming en 1985.

KOREKTO

Sur la supra parto de paĝo 23 de n-ro 11 de EPC 1984, la foto devas esti metita super la titolo S-ANO ILIJA POPOVSKI FORPISIS.

Pro la eraro la redakcio multe bedaŭras kaj petas pardonon de la koncernatoj.

ĈINIO JAM HAVAS ESPERANTO-ELDONEJON

EN 1950 naskiĝis «El Popola Ĉinio». Nun ĝi estas unu el la gazetoj ŝatataj de diverslandaj esperantistoj. Dum la pasintaj 30 jaroj ĉinaj esperantistoj eldonis ne nur tiun gazeton, sed ankaŭ Esperantajn librojn. De 1952 ĝis 1965 la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de «El Popola Ĉinio», kunlabore kun la Fremdlingva Eldonejo, eldonis 96 Esperantajn librojn, inter kiuj «Ĉina Antologio (1949-1959)», «Noveloj de Lusin», «Aŝma», «Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko», bildlibro «Mi Volis Viziti Lernejon», infanlibroj «Karpetoj Transsaltis la Drakpordon», «Ora Hakilo» kaj «Simioj Provas Elakvigi la Lunon», poŝtkarta serio «Orfiŝoj» kaj aliaj estas tre bonvenaj al legantoj, kaj iuj el ili estis plurfoje represitaj.

En 1966, puŝate de esperantistoj, la Fremdlingva Eldonejo fondis la Esperantan Sekcion por eldoni speciale Esperantajn librojn. Ekde tiam la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de «El Popola Ĉinio» ne plu ŝarĝis sin per tia eldonado. De 1966 ĝis 1979 la Fremdlingva Eldonejo eldonis 175 Esperantajn librojn, kiel «Poemoj de Maŭ Zedong», «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» (I, II, III, IV), «Noveloj de Lusin (Plena Kolekto)», «Geografio de Ĉinio», «La Opia Milito» kaj albumoj, bildkajeroj, infanlibroj kaj poŝtkartoj. Inter ili multaj trovis ŝaton ĉe legantoj, kaj iuj estis plurfoje reeldonitaj. Sed la Fremdlingva Eldonejo estas eldonejo kun sekcioj de diversaj lingvoj, kaj oni faras tradukadon

laŭ la sama ĉina originalo. Al ĝi mankis speciala redaktisto por Esperanto, ke la Esperantaj libroj ne portis Esperantan karakteron. Influate de la tiama politika situacio de Ĉinio, oni eldonis ankaŭ iujn politikajn librojn ne plaĉajn al niaj legantoj.

En 1979, la Esperanta Sekcio de la Fremdlingva Eldonejo aliĝis al la redakcio de «El Popola Ĉinio». Pro komuna celo por Esperanto oni povas multe plibonigi sian laboron kaj laŭeble kontentigi la bezonon de esperantistoj. En 1980 kaj 1981 oni eldonis «Aŭtuno en la Printempo» de fama ĉina verkisto kaj esperantisto Ba Jin (Bakin), fratinan verkon de «Printempo en la Aŭtuno» de Julio Baghy, «El

Laborantoj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo





Eldonaĵoj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ĉina Poezio" esperantigitan de fama Esperanta poeto S. J. Zee, "Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero" de Lusin kaj aliajn librojn. La infanlibro "Pesi Elefanton" ricevis premion en UK. Krome por enlandaj Esperanto-amantoj oni eldonis "Kio Estas Esperanto", "Lernolibro de Esperanto" kaj aliajn legaĵojn. Sed oni havis nur malgrandan forton por eldoni malgrandan kvanton da libroj.

En la lastaj jaroj la ĉina Esperanta movado vigle disvolviĝis. Jam pli ol centmil homoj lernis Esperanton. Tio estigis novan problemon: ili bezonas grandan nombron da Esperantaj lernolibroj, referencaj libroj kaj diversaj legaĵoj. Internacie oni metis grandan esperon sur la Esperantan movadon de Ĉinio kaj ĝian eldonadon de Esperantaj libroj. Por kontentigi la bezonon de la situacio, la Ĉina Esperanto-Eldonejo

fondiĝis en la fino de 1981, sub la aŭspicioj de la redakcio de «El Popola Ĉinio» kaj sub la sankcio de la Ŝtata Eldona Buroo. Ĝi estas la unika tiaspeca eldonejo de Ĉinio.

La eldonejo nun estas en perfektegato. Ĝiaj laborantoj el EPĈ-redakcio laboras en malvastaj oficejoj kun ordinaraj tajpiloj kaj ĝia librotenejo estas malgranda. Tamen ĝia eldona laboro rimarkinde progresis. En 1982 kaj 1983 oni eldonis po 8-9 Esperantajn librojn kun ĉ. 60 000 ekzempleroj. En 1984 la nombro de specoj de la eldonitaj libroj leviĝis duoble kaj la eldonkvanto trioble, kun 3.5 milionoj da ideogramoj, kio estis rekorda en la historio. Ĉefaj libroj inter ili estas "Verkoj de Verda Majo" kompilita de ni kaj fama japana esperantisto s-ro Miyamoto Masao kaj romano "Montara Vilaĝo" de fama ĉina verkisto Chun-Chan

(Daŭrigo de p. 3)

Ĉinio estas stabila aŭ ne, tio dependas de la stabileco de la kamparaj loĝantoj. Sen la kamparo kiel stabila bazo, neblas vera stabileco de la urboj, eĉ se ili prosperas. Tial ni devas unue solvi la problemon de la kamparo, praktiki tie malferman politikon kaj mobilizi la aktivecon de 80% de la ĉina loĝantaro. Ni ellaboris tiun politikon en la fino de 1978 kaj post kvin kaj duona jaroj ĝi ricevis efikon. La Tutlanda Popola Kongreso, kiu okazis antaŭ nelonge, decidis, ke la reformo transiru de la kamparo al la urboj kaj estu farata ne nur en industrio, sed ankaŭ en la aliaj fakoj kaj entreprenoj, kiaj tiuj de mon-cirkulado kaj edukado. Unuvorte, ni devas daŭrigi la reformon enlande kaj pluapase praktiki la politikon malferman al eksterlando. Ni jam malfermis 14 grandajn kaj mezgrandajn marbordajn urbojn. Al Ĉinio estas bonvenaj eksterlandaj investaĵoj kaj teknikoj. Ankaŭ administrado estas tekniko.

Ĉu ĉio ĉi malutilas al nia socialismo? Deng Ŝjaŭping opinias tion neebla. Ĉar nia lando prenas la socialisman ekonomion kiel la ĉefan. La

socialisma ekonomia bazo estas tre granda, ke dek miliardoj kaj eĉ cent miliardoj da eksterlandaj investaĵoj ne povas malutili al nia socialisma ekonomia bazo. Kaj krome, ni persistas en la socialisma distribua principo kaj ne faras polarizon. Tiukaze niaj aplikataj fremdlandaj investaĵoj servos certe kiel grava suplemento de la socialisma konstruado. Nun la suplemento estas nemankigebla. Kompreneble tio pliiĝos negativajn faktorojn, tamen ili estos multe malpli grandaj ol la pozitiva efiko alportita de nia rapida disvolvado.

NI ESTAS FIDOPLENAJ

Interparolante kun fremdlandaj amikoj, Deng Ŝjaŭping havis plenan fidon al socialismo kun ĉinaj trajtoj. Li diris, ke ni havas ankoraŭ tiajn kaj aliajn mankojn. Tio estas neevitebla. Se nur ni persistas en tiu vojo, ili povas esti forigitaj unu post alia. Ni estas kontentaj pri la rapideco de disvolviĝo en la pasintaj kvin kaj duona jaroj. La rapideco estis pli granda ol kiel ni supozis. Ni havas plenan fidon kaj esperon al tio, ke la totala produktovaloru de niaj industrio kaj agrikulturo kvarobliĝos en la fino de tiu ĉi jarcento.

Yeh, tradukita de William Auld el la angla. (La lasta estas la unua ĉina libro en "Serio Oriento-Okcidento" de la Universala Esperanto-Asocio.) Krome oni eldonis ankaŭ "Rakontoj pri Afanti", kiu kolektis ĉinajn popolrakontojn, kaj mikro-novelon "Bukedo al Vi". Por turisma vojaĝo de esperantistoj, oni eldonis "40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio" kaj "Pitoreska Pekino". Oni eldonis ankaŭ bildfoliojn "Ĉinio en Bildoj" kaj bildlibron "Hejmoj de Birdoj" kaj infanlibrojn "Kolorigu" k.a., el kiuj "Kiel Kovi" ricevis premion en infanlega konkurso okazigita de UEA en 1984. Krome oni reeldonis "Kio Estas Esperanto" por enlandaj komencantoj. La 30 000 ekzempleroj de ĝiaj unua kaj dua eldonoj estis elĉerpitaj. Nun oni sin preparas por ĝia tria eldono. "Plena Vortaro Esperanta-Ĉina" kompilita de fama ĉina esperantisto Venlo Fon estis reeldonita kun eldonkvanto de 60 000 ekzempleroj kaj lia "Elementa Kurso de Esperanto kun eldonkvanto de 40 000 ekzempleroj.

Krom eldoni Esperantajn librojn por en- kaj eksterlandaj esperantistoj, la Ĉina Esperanto-

Eldonejo ankaŭ kunlaboras kun eksterlandaj Esperantaj organizoj kaj personoj pri presado de iliaj libroj. Ĝi jam presis por UEA "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto" kaj "Esperanta Antologio".

Dank' al rapida multiĝo de lernantoj de Esperanto en la lastaj jaroj, Esperantaj libroj havas grandan debiton en Ĉinio. Tamen pro granda diferenco de salajro kaj prezo inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj pro manko de fremda valuto, aĉeti alilandajn librojn estas preskaŭ neeble por ĉinaj legantoj. Tial la Ĉina Esperanto-Eldonejo portas sur si pezan taskon. Por kontentigi la bezonon de en- kaj eksterlandaj legantoj kaj antaŭenigi la eldonan laboron, oni devas multe klopodi. Nun Ĉinio grandskale reformas sian ekonomian sistemon kaj ankaŭ la Ĉina Esperanto-Eldonejo intencas fariĝi sendependa entrepreno, kiu mem respondecas pri siaj profitoj kaj malprofitoj, paŝon post paŝo aĉeti diversajn necesajn ekipaĵojn kaj pligrandigi sian eldonan kapablon. La eldonejo planas eldoni libroseriojn. Publikiĝis jam ero de libroserio "Fenikso", kiu konigas Ĉinion ĝenerale, kaj parto de

la ĉinaj popolrakontoj. La eldonejo eldonas ankaŭ mikro-novelon kaj scienc-popularigajn legaĵojn. "Ĉina Antologio (1949-1959)", eldonita de la Ĉina Esperanto-Ligo antaŭ dudek jaroj, estas tre bonvena al legantoj. La Ĉina Esperanto-Eldonejo jam planis eldoni "Ĉina Antologio (1919-1949)" kaj "Ĉina Antologio (1960-1982)". Por ke Esperanto eniru en la sciencan kaj teknikan rondojn, la eldonejo metis en sian planon la eldonadon de iuj sciencaj kaj teknikaj legaĵoj. Koloraj infanlibroj kaj poŝtkartoj, dezirataj de esperantistoj, aperos unu post alia. Krom eldoni ĉinajn verkojn por eksterlandaj legantoj, la eldonejo ankaŭ ĉinigos eksterlandajn eminentajn Esperantajn verkojn por ĉinaj legantoj por akceli kulturalan interŝanĝon.

Sub la zorgado kaj subtenado de en- kaj eksterlandaj legantoj kaj amikoj, la Ĉina Esperanto-Eldonejo certe prosperiĝos pli kaj pli. Ĝi fervore servos al ili kaj multe kontribuos por favori la Esperantan movadon de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj akceli la internacian kulturalan interŝanĝon kaj pacan amikan movadon.

NOVA GAZETO EN ESPERANTUJO

NOVA VOĈO

**VOĈO DE
HANDIKAPULOJ**

Aperas 6-foje en la jaro. Ofsete presata. Grafike moderna aranĝo. Enhave riĉa!

Redaktas:

DUSAN ADNADJ

Jen aŭdu nian VOĈON! VOĈO ne lamentas, ĝi: malkovras novan mondon al vi — mondon de handikapuloj, polemikas, proponas, konsilas, helpas, movadumas, recenzas, alproksimiĝas kaj amikiĝas!

Nia VOĈO estas VOĈO por ĉiuj — tio estas ankaŭ via VOĈO Jarabono ne ŝanĝita: 5 US\$, 12.- DM aŭ egalvaloro. Abonu ĉe niaj perantoj aŭ rekte per poŝtenpagilo al adreso: "VOĈO" 56227-Borovo, Ŝkolska ul. 25, Jugoslavio.

Al sama adreso estas bonvenaj viaj kontribuajoj, informoj kaj helpo!

**S-RO BRUNO VOGELMANN
VIZITIS ĈINION**

En septembro de 1984, invitive de la Ĉina Esperanto-Ligo, fama Esperanta aktivulo de FR Germanio s-ro B. Vogelmann vizitis Ĉinion kaj kun Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de ĈEL, diskutis pri kunlaboro kun UEA.

Dum restado en Ĉinio s-ro B. Vogelmann vizitis ankaŭ la urbojn Ŝanhajo, Gujlin, Ĉangŝa, Uhan, Ĉongĉing, Ŝjian kaj Lanĝoŭ, intervidiĝis kun multe da esperantistoj kaj pridemandis ilin pri la Esp-movado kaj renkontitaj malfaciloj en ĝi. En Ŝanhajo s-ro Bakin, prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj kaj vicprezidanto de ĈEL, varme akceptis lin en sia hejmo.

Kune kun li vizitis Ĉinion ankaŭ esperantisto s-ro Siegfried Baier.

**SIMPOZIO DE SCIENC-
TEKNIKA ESPERANTO**

En novembro de 1984 okazis en Uhan la unua Ĉina Simpozio de Scienc-teknika Esperanto. Ĝin ĉeestis 122 reprezentantoj el 25 pro-

vincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio kaj ankaŭ ĝenerala sekretario de ĈEL Ĝang Ĉjiĉeng kaj ĝia konsilanto Daj Song'en.

La simpozio ricevis sume 62 disertaciojn de 71 personoj. La disertacioj temas pri medicino, elektroniko, biologio, kemio, geologio, ĉjigongo (profundspiraj ekzercoj), populara scienco, scienc-teknikaj terminoj k.a. Kvar el la disertacioj estas elektitaj kiel plej elstaraj, inter kiuj estis "Studo de Kamerakva Dinamiko en Ĉinio" verkita de Ĝu Ŭenĵong, "Nova Esploro pri Ĝenerala Leĝo de la Kemiaj Elementoj kaj Ties Signifo en Geokemio" verkita de Daj Liming, "Eksperimento pri la Influo de Natria Bikarbonato al la Asimilo kaj Ekskrecio de Sulfadiazino" verkita de Cuj Ĝiĉin kaj "Difekto en InP Monokristalo kaj la Karakterizo per Kemia Akvatinto" verkita de Ĝuo Ĵujĝeng kaj Liŭ Ĝjan.

Iuj el ili jam aperis en eksterlandaj Esperantaj revuoj en 1984 kaj aliaj publikiĝos en koncernaj en-kaj eksterlandaj gazetoj.

**ESPERANTO-KURSOJ EN TRI
ALTLERNEJOJ DE ĜJANGŜJI**

Ĝjangŝji antaŭe estis provinco, kiu rolis kiel revolucia bazloko

en la 30-aj jaroj. Nun ĝi estas provinco kun riĉaj produktaĵoj kaj brilaj perspektivoj, sed ĝia Esperanto-movado restas kompare postĝinta. En septembro de 1984, tieaj esperantistoj komencis instrui Esperanton. Ili ekfunkciigis nedevigan Esperanto-kurson en la Ĝjangŝji-a Ĉin-medicina Instituto. En la kurso lernas 178 studentoj de la fakultatoj de ĉina medicino kaj ĉin-medicina farmakologio. Samtempe ankaŭ la Ĝjangŝji-a Universitato kaj Ĝjangŝji-a Eduka Instituto fondis Esperanto-kursojn. En la kursoj lernas pli ol 100 instruistoj kaj oficistoj.

**EKSPOZICIO PRI ĈINIO KAJ
ESPERANTO EN FRANCIO**

Franca esperantisto kaj fervora abonanto de EPC s-ro Rene Dorr organizis la 17-30-an de aŭgusto 1984 gravan ekspozicion en Levroux en la centro de Francio, celante propagandi kaj disvastigi Esperanton kaj samtempe konigi Ĉinion al francaj turistoj.

La inaŭguron ĉeestis urbestro de Levroux, s-ro Pierre Delaire, direktoro de la esperantista oficejo el Orleans, prezidanto de la loka filatela klubo kaj multenombraj aliaj personoj.

Prelego ĉe la Simpozio de Scienc-teknika Esperanto

S-ro Bruno Vogelmann kaj ĉinaj esperantistoj sur la Granda Muro



INFORMOJ EL JUGOSLAVIO

1. Esperanto-kurso por kometantoj okazis en Smederevo de Jugoslavio en la lasta oktobro. 90% el la pli ol 50 partoprenantoj estas personoj kun aĝo de malpli ol 30 jaroj. Inter ili troviĝas tri generacioj de la sama familio, t.e. patro kun du filoj kaj nepo de la familio Nikoliĉ. La kurson gvidis s-ro Milorad Djurdjevic, peranto de El Popola Ĉinio en Jugoslavio.

2. En Pirot Esperanto-kursoj funkcias en ĉiuj elementaj lernejoj kaj por gelernantoj de mezaj lernejoj kaj por plenkreskuloj en Domo de Kulturo. Inter la plenkreskuloj estas kelneroj el restoracio de industrio de vestaĵoj "Prvi maj" (Unua de majo), kiu kunlaboras kun la Esperanto-Societo "Tapiŝurbo" en Pirot.

ESPERANTO EN UNIVERSITATO DE ROSARIO


En la fakultato de humanismo de la Universitato de Rosario la dekano prof. Fernando Prieto decidis starigi regulan E-kurson en fakultativa nivelo.

La kurson gvidas s-ro Enrique Kohej, kiu instruis la saman lingvon en la pasintaj ok jaroj en la sama fakultato.

INFORMOJ PRI VENONTAJ OKAZAĴOJ

1. La 58-a SAT-Kongreso okazos de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1985 en Amersfoort, Nederlando.

2. Feriosemajno okazos en Slenaken en la plej suda parto de Nederlando de la 20-a ĝis la 27-a de julio, 1985. Pliaj detalaj informoj kaj aliĝilo akireblaj ĉe sekretariino A. Noordewier-Jagtenberg, Emmalaan 7, 3832AH Leusden, Nederlando.



Esp-kurso en la Ĝjangŝi-a Ĉin-medicina Instituto



Inaŭguro de la Ekspozicio pri Ĉinio kaj Esperanto

3. Nova E-renkontiĝo okazos de la 26-a de aprilo ĝis la 1-a de majo, 1985 en la urbo Tjornarp, Svedio.

Por aliĝi skribu al: Kerstin Rohdin, Alsta, 690 72 SKOLLERSTA, Svedio.



La Supra Ĝangĝjafen-vilaĝo

GE ŜI:

RIĈA VILAĜO EN NORDA ŜANŜJI

POST kiam ni enpaŝis en la nordan parton de la provinco Ŝanŝji, ni aŭdis, ke en ĝi estas la vilaĝo Supra Ĝangĝjafen de la gubernio Zŭojun kiu estas unu el la plej riĉaj en la ĉina kamparo. La vilaĝanoj loĝas en etaĝdomoj ekipitaj per fridujoj, kolortelevidiloj kaj aliaj altklasaj elektraj aparatoj.

La Supra Ĝangĝjafen-vilaĝo situas okcidente de la karburbo Datong. Nia aŭto trairis kampojn kaj eniris en montaran regionon. Kvankam jam komenciĝis la frosta vintro, tamen kuris tien kaj reen diversaj veturiloj. Trairinte la min-regionon, nia aŭto sin turnis en kvietan montvalon larĝan malpli ol 200 metrojn. Subite eksaltis en niajn okulojn kvar bonorde vicigitaj etaĝdomoj. Nia akompananto kamarado Ĉji montris al ni, ke tiu estas la Supra Ĝangĝjafen-vilaĝo.

La aŭto haltis antaŭ la kvar-etaĝa oficdomo de la vilaĝa registaro. Ni elaŭtiĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Ho, la du montoj ĉirkaŭprenas la valon, kie oni povas vidi nur duonon de la ĉielo. Se la kvar-etaĝa domo starus en granda urbo, ĝi estus kvazaŭ alumet-skatolo. Sed en tiu malvasta valo ĝi aspektas tre impone.

Oni akceptis nin en la bele meblita salono de la dua etaĝo. Sur la muroj pendas grafikaĵoj kaj statistikoj pri la vilaĝo en la pasinteco kaj en la nuntempo.

Respondeculo Zŭo Ŝeng de la vilaĝo koncize rakontis al ni pri la vilaĝo.

La Supra Ĝangĝjafen-vilaĝo situas en la alta kaj frosta montregiono. Ĝi havas 55 familiojn kun 260 anoj kaj 80 hektarojn da kampoj pliparte

kuŝantaj sur deklivoj. La tero estas sterila kaj ofte okazas naturaj katastrofoj, kio malfavoras al agrikultura produktado. Antaŭe la loko estis fama pro sia malriĉeco. Cirkulis tie jena popolkanto: “Viroj migras aliloken por vivopano; virinoj kolektas herbojn por vivoteno.” Post la Liberigo en 1949, la agrikultura produktado progresis certgrade, sed la tiamaj politikoj permesis al la kamparanoj sin okupi nur pri agrokulturado kaj malpermesis al ili ekspluati riĉan fonton de karbo kaj fondi aliajn industriajn kaj flankokupajn entreprenojn. Tial la kamparanoj longtempe vivis en mizero. Tial la plej alta pokapa jarenspezo atingis nur pli ol cent jŭanojn (2.7 jŭanoj = 1 usona dolaro).

Dank’ al la praktikado de la politiko prosperigi enlandan ekonomion ellaboritan de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio ekde 1978, la respondeculoj de la vilaĝo gvidis la lokanojn por fondi industriajn kaj flankokupajn entreprenojn kun karboekspluato kiel la ĉefa, persiste irante la vojon de sinteza disvolvo de agrikulturo, industrio kaj flankokupo. Rezulte de tio, la pokapa jarenspezo en 1979 atingis 510 jŭanojn, en 1980—1 019 jŭanojn, en 1983 — 2 500 jŭanojn kaj en 1984 — 5 000 jŭanojn. En 1983 ĝi jam famiĝis kiel “1 000-jŭana vilaĝo” en la provinco. La publika akumulo atingis 1.04 milionojn da

jŭanoj, kaj ĉiu familio havis deponaĵon en ŝparkaso.

Ĉe tio Zŭo Ŝeng montris neelteneblan fierecon. Li diris al ni, ke la riĉiĝo alportis al la vilaĝo grandajn ŝanĝojn.

Unue, ŝanĝiĝis la fizionomio de la vilaĝo. Antaŭe plejparto de la vilaĝanoj loĝis en senlumaj kaj malvastaj kavernodomoj. En la vilaĝo troviĝis nek strato, nek korto. De 1980 vilaĝanoj konstruis novajn domojn kaj kavernodomojn kun 165 ĉambroj, ĉiu familio havas po 3 ĉambrojn. Nun ili konstruas kvar duetaĝajn domojn. Krome, oni pavimis la straton per cemento kaj plantis multe da arboj en la vilaĝo.

Due, progresis la afero de kolektiva bonstatego. Antaŭe la eduka afero estis postiĝinta. En la lastaj jaroj la kolektivo investis 600 000 jŭanojn por konstrui domon por elementa lernejo kaj kulturalan domon, invitis instruistojn, preparis uniformojn por lernejoj, praktikis senpagan edukadon kaj donis stipendion. Ĉiuj 69 infanoj de la vilaĝo nun vizitas la lernejon. Krome, oni konstruis teatron kaj banejon, aĉetis projekciatoron, praktikas senpagan kuracadon, starigis pensiosistemon por la vilaĝanoj kaj donis subvencion al la senhelpaj maljunuloj.



En la domo de kamparano Han Ŝenguj

Trie, tute noviĝis la vilaĝa moralo. Antaŭe, pro malriĉeco kaj postĝinteco, ofte okazis kverelado, ŝtelado, vetado kaj eĉ superstiĉa aktivado. Nun oni jam ellaboris vilaĝan regularon, funkciiĝis moraligan lernejon, tiel ke malaperis ŝtelado, vetado, superstiĉa aktivado, kverelado ktp. Nun en la vilaĝo estas laŭdataj diligenteco, unuiĝo, interhelpo kaj harmonia vivo.

Kvare, ŝanĝiĝis laborkondiĉoj. Nun la vilaĝo havas ŝarĝaŭtojn, traktorojn, buldozojn kaj maŝinojn por plugado, irigaciado kaj prilaborado. La vilaĝo investis 150 000 jŭanojn por konstrui kaj plibonigi 30 hektarojn da ŝtuparaj kampoj, kompletigis unu triŝtupan pumpstacion, funkciiĝis du novajn ŝpruc-irigaciajn staciojn, arbarizis 77 hektarojn sur dezertaj montoj kaj plantis 15 000 arbojn ĉirkaŭ loĝejoj kaj ambaŭflanke de vojoj.

Elirinte el la vilaĝa oficejo, ni vizitis la hejmon de Han Ŝengguj, akompanate de vilaĝa respondeculo. La mastro loĝas en duetaĝa domo nove konstruita. En ĉiu domo loĝas ses familioj, kiuj ĉiuj havas po ses ĉambrojn kun plankareo de 110 kvadrataj metroj. Antaŭ la domoj estas vico da pinoj. Antaŭ kaj post la domo de ĉiu familio kuŝas po unu korteto ĉirkaŭita de palisaro.

La mastro ne estis hejme, nin akceptis Jan Njugen, la edzino de Han Ŝengguj. Ŝi diris al ni, ke ŝia familio havas kvin membrojn. Ŝia edzo laboras en la karbominejo de la vilaĝo, ŝi mem sin okupas pri agrokulturado. Ili havas du ŝarĝaŭtojn, unu el kiuj veturigas ŝia 20-jara filo kaj la alian dungita ŝoforo. Ŝia dektri-jara filino lernas en mezlernejo kaj ŝia plej juna filo aĝas nur kvin jarojn.

Menciinte pri la pasinteco, la mastrino sentis kordoloron. En la sesdekaj jaroj ŝi edziniĝis al Han Ŝengguj kaj loĝis en malalta kaduka kaverno-domo, ke ŝi ofte frapis la kapon kontraŭ la lintelon de la pordo. En la mezo de la kavernodomo estis tera vazo, kiu entenis la tutan havaĵon de ŝia familio.

Nun tute aliiĝis la fizionomio. La mastrino kondukis nin por rigardi ĉiun ĉambron. Krom unu ĉambro en la dua etaĝo destinita por konservi grenojn, ĉiuj aliaj kvin ĉambroj estas ekipitaj per kompletoj da mebloj kaj sofoj. La terlito por la geedzoj estas kovrita per du altklasaj tapiŝoj, kiuj kostas 1 500 jŭanojn, kaj elektra matraco. Krome, ŝi havas ankaŭ du kolortelevidilojn, magnetofonon, fridujon kaj elektran stebilon. Se ni ne pro-

praokule vidus, ni certe ne kredus, ke la kamparano, kiu estis malriĉa antaŭ kelkaj jaroj, nun havas tiel altkvalitajn provizaĵojn.

En ŝia kuirejo ni malfermis la fridujon kaj vidis, ke en ĝi estas metitaj boteloj da biero, fiŝoj, porkviando, ovoj kaj aliaj. Kaj sur la apuda plato estis metita unu tuta ŝafkorpo. Mi demandis ŝin, kiom da mono ŝi devas elspezi por ĉiutaga manĝo. Ŝi respondis, ke ĉiutage ili bezonas 14-15 jŭanojn, t.e., ĉiu membro bezonas ĉirkaŭ 90 jŭanojn monate, duoble pli multe ol la plej alta elspezo de familio de Pekino por manĝo. Ni ŝerce diris al ŝi: "Kompare kun vi, ni urbanoj ja estas veraj 'malriĉkamparanoj!'" La mastrino kun rido diris: "Tio estas bagatelo, ke ĉiu el ni elspezas maksimume mil jŭanojn jare por manĝo. En 1984 la neta enspezo de mia familio estis pli ol 60 000 jŭanoj! La nuna politiko de la registaro kondukas nin al la vojo de riĉiĝo, kaj ni des pli riĉiĝos estonte!"

Elirinte el la hejmo de Han Ŝengguj, ni preterpasis brikajn kaverno-formajn domojn starantajn en vicoj apud la vojo. La respondeculo diris al ni, ke ili estas unue konstruitaj domoj post la riĉiĝo. Kaj nun loĝas tie ankoraŭ parto da vilaĝanoj. Oni planas konstrui novajn etaĝdomojn por ilin anstataŭigi. Ni volis viziti iun familion, la akompananto frapis je la pordo de iu familio, sed neniu respondis, tamen la pordo ne estis ŝlosita. Ni eniris kaj trovis neniun. En la pura ĉambro, bonorde metitaj estis televidilo, magnetofono, lavaŝino, kudromaŝino, kofroj kaj ŝrankoj. Ni atendis en la ĉambro ĉirkaŭ dek minutojn, sed la mastro ankoraŭ ne revenis. "Ŝajnas, ke ili iris al laboro," diris la akompananto. Ĉe forlaso de sia hejmo oni ne ŝlosas la pordon! Kia moraleco! Ĉinaj antikvuloj diris: "Popolanoj scias honoron kaj honton, se ili havas sufiĉajn manĝaĵojn kaj vestojn." Riĉiĝo plibonigas la moralon. Jen tie mi vidis la plej konvinkan ekzemplon de nobleco.

La vilaĝoj, kia la Supra Ĝangĝjafen-vilaĝo, nun ankoraŭ ne videblas ĉie en Ĉinio. Sed ĝi estas la morgaŭo de la ĉina kamparo, kaj ĝia morgaŭo fariĝos des pli bela.



Lŭojang, Urbo Abunda je Antikvaj Restaĵoj

de ŬEJ LJAŬ

Fotoj de GOŬ CINGJUN

LŬOJANG, situanta ĉe la suda bordo de la meza parto de la Flava Rivero en la okcidenta Henan-provinco, estas fama antikva kultura urbo de Ĉinio kun historio de pli ol 3 000 jaroj. En mil jaroj ekde la Orienta Ĝoŭ-dinastio en la 8-a jarcento a. K. 9 dinastioj sinsekve prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. Laŭ plej nova esploro arkeologoj asertis, ke 300 jarojn antaŭ la Orienta Ĝoŭ-dinastio, Ŝang-dinastio jam konstruis tie sian ĉefurbon. En la antikveco la urbon ofte frekventis literaturistoj kaj aromis tie peonioj, kaj pro tio la urbo ricevis la belajn nomojn "Urbo de Poemoj" kaj "Urbo de Floroj".

Lŭojang abundas je historiaj restaĵoj, mitoj, legendoj kaj anekdotoj pri literaturistoj.

"Montpejzaĝo de Longmen" estas la unua el la ok pejzaĝoj en Lŭojang. Legendo diras, ke la loko Longmen (Draka Pordo) antaŭe estis granda monto kaj poste estis hakita de la akvobrida heroo Ju de Ŝja-dinastio (ĉ. 21-16-a jc. a. K.) en orientan kaj okcidentan partojn. Rigardate de malproksime, la du krutaj rokmuoj de la monto, kvazaŭ tranĉitaj, starantaj unu kontraŭ la alia ambaŭborde de la rivero, similas al grandega pordo. La rivero Jiŝuj fluas tra la pordo en la Flavan Riveron. Longmen-ŝtonkavernaro, unu el la tri grandaj artaj trezorejoj de Ĉinio, dense lokiĝas kiel abelujo sur la du rokmuoj.


Longmen-ŝtonkavernaro havas pli ol 2 100 kavernojn kun pli ol 97 300 budhaj statuoj, 39 pagodoj kaj pli ol 3 600 steleoj. La budhaj statuoj estas malsamaj en grandeco kaj mieno. La statuo de budho Losana altas 17.14 metrojn, kun oreloj longaj je 1.9 metroj. El la 15 000 budhaj statuoj sur ambaŭflankaj muroj de la Dekmil-budha Kaverno la plej malgrandaj altas nur kelkajn centimetrojn, sed aspektas versimile, kaj eĉ iliaj barboj kaj brovoj estas videblaj.

Longmen-ŝtonkavernaro estis konstruita frue en ĉ. 494 p. K., kiam la Norda Ŭej-dinastio translokis sian ĉefurbon al Lŭojang.

En la sekvantaj 400 jaroj de la dinastioj Suj (581-618 p. K.) kaj Tang (618-907 p. K.), ĝi estis grandskale rekonstruita. Se oni bone komparas la budhajn statuojn faritajn en la malsamaj periodoj, oni povas vidi iliajn malsamajn artajn stilojn en tiuj dinastioj. Ekz., la ĉefa statuo de Ŝakjamunio en la kaverno Binjang skulptita en la Norda Ŭej-dinastio (386—534 p. K.) havas belan vizaĝon kaj maldikan kolon kun ŝvebantaj variaj vestofaldoj. Kvankam lia korpo iom kliniĝas antaŭen, liaj okuloj rigardas malsupren kaj liaj buŝanguloj vidigas prudenton kaj nekutiman rideton, tamen li ŝajne ne zorgas pri la homa mondo. Sed la ĉefa statuo

Strato de Lŭojang





Lakita skulptaĵo de Ĵuan-dinastio en la templo Bajma

de Losana skulptita en Tang-dinastio havas kvadratan vizaĝon, grandajn orelojn, mallongan kolon, sanan kaj dikan korpon. Li sidas stabile. Li havas pli da humaneco kaj intimeco. Lia serioza kaj afabla mieno montris, ke li tre volas proksimiĝi al la homoj kaj zorgi pri tiu ĉi mondo, ne kiel dio neatingebla.

Bajma-templo, 12 kilometrojn oriente de Lŭojang, estas la unua templo konstruita de feŭda registaro en 68 p. K. post enkonduko de budhismo en Ĉinion. Legendo diras, ke en Han-dinastio (206 a. K.-220 p. K.) imperiestro Mingdi sendis korteganon al Tjanĝu (nun Hindio). La kortegano kune kun bonzo de Tjanĝu revenis al Lŭojang, alportante sutrojn kaj budhostatuojn per blanka ĉevalo. En la templo konserviĝas steleoj de Song- kaj Ĵuan-dinastioj (10-14-a jc.) kaj statuoj de Ĵuan- kaj Ming-dinastioj (13-17-a jc.). La statuoj de budhoj Dipamkara, Ŝakjamunio, Majtreja kaj Dharmapala kaj arhatoj en la Mahavira Halo estas raraj en nia lando.

Sudoriente de la templo staras la eleganta Ĉijjun-pagodo kons-

truita en la 10-a jarcento kaj riparita en la 12-a kaj 13-a jarcentoj. Estas interese, ke kiam oni manklakas antaŭ la pagodo, aŭdiĝas resonado, kvazaŭ kvako de rano.

Ok kilometrojn sude de Lŭojang estas la granda antikva templo Gŭanlin kun ruĝaj muroj kaj helverdaj tegmentoj. Tie entombiĝis la kapo de Gŭan Ju, fama ĉina generalo en la frua periodo de la Tri Regno (220-280 p. K.). Li mortis en 219 p. K. La templo kaj maŭzoleo estis konstruitaj en Ming-dinastio antaŭ pli ol 380 jaroj. La haloj, pavilonoj kaj kioskoj estas konstruitaj bonorde. Sur la ŝtonaj balustradoj ambaŭflanke de la meza vojo skulptiĝis multaj ŝtonaj leoninoj kun idoj en la sino aŭ sur la dorso. Sur la kolonoj kaj traboj estas pentraĵoj pri la vivo de Gŭan Ju. En la korto staras altaj antikvaj cipresoj, kiuj vekas ĉe la vizitantoj memoron pri antikvaj okazaĵoj.

Krome, en Lŭojang troviĝas ankaŭ palacaj ruinoj de Ŝja- kaj Ŝang-dinastioj, maŭzoleoj de Han-dinastio, ĉefurbaj ruinoj de Han- kaj Ŭej-dinastioj, palacaj ruinoj de Tang-dinastio ktp.

Estas tre agrable rigardi belajn peoniojn en Lŭojang en aprilo. Peonio estas la urba floro de Lŭojang. Ĉiuaprile la urbo okazigas ekspozicion de peonioj. Tiam la diverskoloraj kaj diversspecaj peonioj elspiras delikatan aromon kaj altiras al si turistojn.

El la metiartaĵoj produktitaj de Lŭojang la plej famaj estas la tri-koloraj ceramikaĵoj en stilo de Tang-dinastio faritaj de la Lŭojang-a Belarta Ceramikaĵa Fabriko. La fabriko heredis la tradicion faradon kaj glazuran teknologion, ke ĝiaj tri-koloraj ceramikaj ĉevaloj, kameloj kaj aliaj bestoj similaj al la antikvaj aspektas fortikaj kun dikaj muskoloj. Kaj ĝiaj tri-koloraj glazuritaj ceramikaj servistinoj, muzikistinoj, dancistinoj kaj aliaj homfiguroj estas pli sveltaj kaj graciaj. Nun la fabriko elfaris novan produktaĵon — tri-koloran glazuritan ceramikan freskon, kiu havas fluajn liniojn kaj brilajn kolorojn kaj impresas elegante kaj pompe.

Krome, la palacaj lanternoj de Lŭojang, famaj pro siaj delikateco kaj diverseco de specoj, havas grandan debiton en la internacia merkato.

En Lŭojang oni povas ĝui famajn lokajn pladojn, kiaj kokaĵo marinata per fama Dukang-alkoholaĵo kaj buntaj loligo-strioj. Se vi havas intereson, petu lokan kuiriston prepari por vi malvarman miks-pladon. Kiam vi trovas, ke la delikataj manĝaĵoj en la plado estas tiel aranĝitaj, ke ili aspektas kiel la vidita montpeizaĝo de Longmen, vi tuj eksentas apetiton.


En Lŭojang oni povas pasloĝi en la hotelo "Amikeco". Ĝi servas ne nur per komfortaj ĉambroj, sed ankaŭ per akupunkturo kaj masaĝo. En la hotelo vi povas aĉeti diversajn lokajn metiartaĵojn kaj ĝui bongustajn lokajn pladojn.



Parto de Lüojang

En la templo Gūanlin





1. Longmen-ŝtonkavernaro




2. Ĉijun-pagodo ekster
la templo Bajma

3. Peonioj

4. Trikolora ceramikaĵo en
Tang-dinastia stilo



1	2
3	4





Mej Lanfang ludas Mu Gujing.

MEJ LANFANG KAJ LA PEKINA OPERO

de CAŬ BAJLONG


Fotoj de la Instituto pri Teatro

Mej Lanfang en "Glavo Juĝou"



Mej Lanfang (dekstre) en "Songŝo en Ĝardeno"





S-ro Mei Lanfang



Mei Lanfang kaj Chaplin

EN la pasinta oktobro ĉinaj literaturistoj kaj artistoj okazigis en Pekino kunvenon por soleni la 90-an datrevenon de la naskiĝo de Mei Lanfang, aktoro-majstro de la pekina opero. Samtempe okazis simpozio kaj prezentado memore al Mei Lanfang.

En la prezentado partoprenis eminentaj aktoroj de Mej-skolo de Ĉinio, kiuj heredis kaj pluapasaŝe disvolvis la arton de Mej-skolo.

Majstro Mei Lanfang estis elstara heredanto kaj brava pioniro de la tradicia arto de la pekina

opero en ties historio. Li faris multajn kreivajn reformojn en la enhavo, kostumoj, ŝminkado, danco, muziko kaj kanto de la pekina opero. Li lerte kombinis kaj praktikis la prezentajn artojn de kantado, recitado, gestado kaj luktado de diversspecaj heroinoj.



Mei Lanfang (la kvara de dekstre) en Sovetunio



lipharojn por esprimi sian justamon. Li preferis vivi mizeran vivon ol genuiĝi antaŭ la agresantoj. Tio montris lian noblan patriotismon. Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito li fervore partoprenis en la patriota demokratia movado kaj kun plena fido atendis la naskiĝon de la nova Ĉinio. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko li entuziasme servis al la popolo per sia arto. Eĉ en la aĝo de 65 jaroj li ankoraŭ prezentis novajn pekinajn operojn. En la 50 jaroj li gajnis al si milionojn da spektantoj per sia bela arto. Lia nomo estas konata ĉie en Ĉinio. En 1961 li forpasis pro malsano.

Mej Lanfang estis la unua aktoro-majstro de Ĉinio, kiu enkondukis la ĉinan teatraĵon en aliajn landojn kaj ĝuis tie altan renomon. En 1919, 1924 kaj 1956 li faris prezentadon en Japanio; de la fino de 1929 ĝis la komenco de 1930 li faris tion en Usono; kaj en 1935 li turneis en Sovetunio. Lia arto estis laŭdata de eksterlandaj artaj majstroj Chaplin, Stanislavskij, Nemiroviĉ-Danĉenko, Brecht kaj aliaj. Lia eksterlanda prezentado akcelis kulturen kaj artan interŝanĝon inter la ĉinaj kaj alilandaj teatraĵrondoj.

En sia pli-ol-50-jara artista vivo li kreis multajn belajn artajn figurojn kaj scipovis ludi grandan nombron da famaj pekinaj operoj, tiel ke formiĝis Mej-skolo kun apartaj stiloj de arto. Lia arto estas unu el la plej altaj atingoj en la teatra historio de Ĉinio kaj donis al la ĉinaj artistoj pozitivan kaj profundan influon.

Mej Lanfang estis ankaŭ lojala patrioto. Kiam la ĉina popolo frontis al la malfacila periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en la 30-40-aj jaroj, li ludis la pekinan operon kaj per tio kuraĝigis la popolon batali por ŝanĝi sian kaj nacian sorton. Dum la regado de la malamikoj li decideme rifuzis sursceniĝi kaj kreskigis la

Mej Lanfang kaj usona filmaktorino


Mej Lanfang (la tria de dekstre en la unua vico) rigardas prezentadon de japana artisto.



(Daŭrigo de p. 11)

punktura kaj Moksa Instituto fondita en 1947 en Parizo, la Monda Akupunktura kaj Moksa Konferenco fondita en 1965 en Tokio, la Monda Akupunktura kaj Moksa kaj Ĉinmedicina Simpozio fondita en 1973 en San-Francisko kaj la Monda Scienca Federacio de Akupunkturistoj kaj Moksistoj kaj Akupunkturaj kaj Moksaj Asocioj fondita samjare en Monako. La Monda Akupunktura kaj Moksa Konferenco jam kunvokis 9 internaciajn simpoziojn pri akupunkturo kaj mokso.


Por fondi pli aŭtoritatan, pli reprezentan kaj pli universalan esploran organizon de akupunkturo kaj mokso, de la 10-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1984, okazis prepara kunveno de la Monda Unio de Akupunkturaj kaj Moksaj Institutoj. Ĝin partoprenis reprezentantoj kaj observantoj de 16 landoj. La celo de la unio estas akceli la unuiĝon kaj kunlaboron inter diverslandaj akupunkturaj kaj moksaj rondoj, oftigi la internacian akademian interŝanĝon de akupunkturo kaj mokso, pluaŝe popularigi kaj disvolvi akupunkturaron kaj mokson kaj strebi por realigi la celon prezentitan de la Monda Sana Organizo: "Ĉiuj homoj ĝuos sanprotektion ekde la jaro 2000." La ĉefa tasko de la unio estas organizi kaj kunvoki mondan akupunkturaron kaj moksan kongreson kaj simpozion, fari akademian interŝanĝon de akupunkturo kaj mokso, akceli amikan viziton inter diverslandaj akupunkturaj kaj moksaj rondoj, propagandi kaj disvastigi akupunkturaron kaj mokson, disvolvi akupunkturaron kaj moksan instruadon, kuraĝigi tian studon kaj eldonadon de tiaj revuoj kaj libroj. La reprezentantoj post konsiliĝo difinis la sidejon de la unio en Pekino.



Cinaj akupunkturistoj en Japanio

Por perfektigi la akupunkturaron kaj moksan arton, diverslandaj akupunkturistoj kaj moksistoj faris ĉiam oftan interŝanĝon de akupunkturo kaj mokso en la lastaj jaroj. El ili pli multaj deziras fari akademian interŝanĝon kun ĉinoj. Depost 1983 la Japana Instituto pri Ĉinaj Akupunkturo kaj Mokso 14-foje sendis siajn fakulojn al Ĉinio por interŝanĝi spertojn.

Tiu ofta internacia akademian interŝanĝo sendube estas ĝojiga. Subtenate de la Monda Sana Organizo de UNO kaj post la oficiala fondiĝo de la Monda Unio de Akupunkturaj kaj Moksaj Institutoj, oni povos daŭre fari interŝanĝon. Tio certe akcelos la aferon de akupunkturo kaj mokso kaj servigos ilin pli bone al la diverslandaj popoloj.



Cinaj akupunkturistoj en Jugoslavio

SUR MONTA VOJETO

(MIKRONOVELO)

SUR monta vojstreko estis tri vojirantoj en gaja babilado.

“Instruistino! Kiun filmon hodiaŭ oni projekcios?”

“«Vilaĝa Instruistino».”

“Ĉu la historio kiun vi jam rakontis al ni?”

“Jes.”

Du infanoj manklakis kaj ĝoje kaptis brakojn de la instruistino.

“Instruistino, mi volas lerni pentradon,” diris unu el la du infanoj.

“Kiu instruos vin?”

“Certe vi!”

“Instruistino, mi volas lerni violonludon,” diris la alia.

“Ĉe kiu vi lernos?”

“Certe ĉe vi.”

Aŭdinte la vortojn de la infanoj, ŝi ridetis senprefere. Frapis ŝin dolora sento. Ŝi ne kuraĝis konfesi, ke ŝi ne povas pentri, nek violoni. Ŝi ne volis vundi la koron de la infanoj. Vilaĝo profunde en montoj havis lernejon nur kun unu klasĉambro kaj ŝi estis sola instruisto. Ŝi instruas lernantojn de pluraj klasoj, ŝi sentas sin malgranda kiel paruo.

En babilado ili piediris kvar kilometrojn kaj venis al Liŝuŝan.

Post kiam ili rigardis la filmon, jam estis malfrua nokto, ili haste reiris al sia vilaĝo.

La monta vojeto malklariĝis, nigraj montpintoj staris unu tuj apud alia, altensiaj dratoj siblis, arboj en valo susuris, velkaj folioj levitaj de vento turniĝis ĉe iliaj piedoj.

La du infanoj streĉis la okulojn kaj rigardis antaŭen. Kun bateganta koro ili forte tenis la manon de la instruistino. Ambaŭ ili sentis timon. Antaŭe ili ne kuraĝis iri la vojeton en malluma nokto. Sed hodiaŭ ili pensis: Estu maltima, kio estas timinda? Nia instruistino akompanas nin!

Ŝi klopodis sin teni aplombe, por ke la lernantoj ne rimarku ŝian timon. Sed ŝia batanta koro kvazaŭ elsaltus, ŝi pretervole ek-tremis, ŝiaj ŝultroj skuetiĝis.

“Ĉu vi timas, instruistino?”

“Mi. . .” Frap, frap, frap! Le-viĝis subite stranga sono, io trans-flugis super ili. Ŝi timigite ĉirkaŭ-prenis al sia sino la du infanojn. Ŝia koro batis forte, sed ŝi konsolis la infanojn: “Ne timu, ne timu, estas fazano.”

La du infanoj, kiel ŝafidoj, longe ne kuraĝis eligi sonon en ŝia sino.

Post unu minuto ŝi ŝvitis. Ŝi malrapide retiris siajn manojn kaj ili iris plu antaŭen. Post iom da tempo, la infanoj fariĝis tran-kvilaj, sed ŝia koro ankoraŭ batis forte.



“Vere kuraĝa vi estas, instruistino,” diris sinsekve la infanoj.

“Ĉu vi timas?”

“Mi iom timas, estas ne grave, ni ja iras kun vi!”

“Prave, ni havas vin apude!”

ĜANG LIĈJUN:

ĈTVEŝPERA SIRINGO

(MIKRONOVELO)

ŜI ĝustatempe preparis termotason da lakta trinkaĵo kaj surtabligis panon kaj du blankajn kaj grandajn kuiritajn ovojn. Poste ŝi forlasis la kuirejon kaj revenis en sian ĉambron. Ŝi sidiĝis antaŭ la tualetan tablon kaj atente rigardis en spegulon por vidi sian ovalvangan vizaĝon kun alta nazo kaj karbe nigraj okuloj. “Li amos min dum la tuta vivo.” Ŝi pensis, la sango ĵetiĝis al la vangoj, en palpebrumo leviĝas al ŝi la subtila dubo: “Ĉu vere? Pasis nur unu tago post la geedziĝo, kaj li jam iris al la laboro. Ĉu la universala frezmaŝino pli allogas lian koron?” Apogante sian mentonon sur la mano, ŝi rigardis sin en la spegulo. “. . . Vi vere estas stulta, li ja petis de vi forpermeson. Vi ja kapjesis, kun via konsento li iris al la laboro. Vi unuafoje uzis la rajton de edzino.” Ŝi fingre

Ili transiris monton, ĉirkaŭiris kelkajn valojn kaj trairis vojon inter arboj. Ili estis baldaŭ descendontaj la monton.

“Se oni refoje projekcios filmon en Liŝuĉan, ni iros ankoraŭ kune kun vi, instruistino.”

“Ĉu vi vere ne timas?”

“Kion ni timas? Vi ja estas kun ni!”

“Prave! Vi gvidas nin!”

Ŝi ne scias, pro kio ŝiaj okuloj pleniĝis de larmo.



tuŝis sian nazon en la spegulo, “vere stulta”.


Ŝi facilpaŝe malsupreniris, senbrue kiel kateto, tamen kun gaje batanta koro. Ŝi jam pretigis la respondon, kiam ŝin renkontos najbaroj kaj demandos kien ŝi iras tiel malfrue en la deka. Ŝi respondos, ke iras promeni.

Milda nokta vento karesis ŝian belan hararon. Ho, kiel aroma vento! Sub lamplumo, tufoj kaj tufoj da siringaj floroj eligis agrablan odoron. Ŝi pretervole faris profundan enspiron. “Kial mi ne rimarkis la floradon de siringoj,” ŝi pensis. “En tiuj tagoj mi okupiĝis pri la geedziĝo kaj forgesis la printempon.” Rigardante siringajn

florojn, ŝi sentis ian bedaŭron. Ŝi subite ekpensis, ke ŝi forgesis ne nur la printempon, sed ankaŭ la laboron. En la floroj kvazaŭ vidiĝus naivaj vizaĝetoj kaj aŭdiĝus vokoj de infanoj. Ŝi sentis, ke ŝi forlasis la infanojn ne du tagojn, sed kvazaŭ du jarojn. “Morgaŭ ankaŭ mi iros al mia laboro. . .” ŝi pensis. “Kompreneble, mi certe atentos lin reveni de la nokta skipo.”

Leviĝis nokta vento, la floroj ŝanceliĝis, kvazaŭ salutus ŝin. Kun rideto ŝi facilpaŝe iris al la aŭtohaltejo. Ŝia bela staturo kunfandiĝis kun la aroma nokto.

Ĉi-vesperaj siringaj floroj vere estas aromaj. . .



KONKURSO DE DRAKBOATOJ

de UEN ĜJAŬ

APENAŬ la suno aperis el la horizonto la 16-an de septembro, 1984, jam ekviglis homoj sur la Okcidenta Rivero proksime al la urbo Foŝan de la provinco Ĝuangdong en la suda parto de Ĉinio. Sur la rivero larĝa pli ol mil metrojn kolektiĝis multe da boatoj; ambaŭborde de la rivero flirtis diverskoloraj flagoj kaj svarmis homamasoj. Tie okazis la Unua Tutlanda Konkurso de Drakboatoj.


Je la 9-a matene en gaja bruo de petardoj kaj tamburado ses koloraj drakboatoj kvazaŭ gigantaj drakoj kuris sur la rivero. En ĉiu boato remis 20 konkursantoj. Ili remadis tutforte por gajni la ĉampionecon. Ambaŭborde 300 000 spektantoj huraadis por ilin kuraĝigi. La konkurso finiĝis je la sepa vespere. La ĝuangdong-a teamo gajnis la ĉampionecon kaj la fuĝjan-a kaj siĉuan-a teamoj gajnis respektive la duan kaj trian lokojn.

Oni diras, ke la konkurso de drakboatoj komence okazis memore al la ĉina patriota poeto Ĉju Jŭan de la tria jarcento a.K. Li estis ekzilita de la reĝo pro kalumnio de malicaj aŭtoritatoj. Li vidis per siaj propraj okuloj, ke la ŝtato malprosperas, la popolo migrante vivas mizeran vivon, kaj trovis ke ne estas espero savi la landon, tial li sin dronigis en la riveron Milŭo. Por elsavi lin multaj veturigis fiŝboatojn sur la rivero. Poste tio fariĝis popola sporta aktivado. Preskaŭ en ĉiuj riveroj de suda Ĉinio okazas ĉiujare tia aktivado. La ĉifoja konkurso estis la unua tutlanda konkurso, post kiam la konkurso de drakboatoj estis difinita kiel oficiala sporta disciplino. 10 provincoj kaj unu aŭtonoma regiono de la suda parto de Ĉinio sendis siajn teamojn al la konkurso.

La nivelo de drakboata remado de Ĝuangdong-provinco estas relative alta. Laŭ kutimo en

Ĝuangdong-provinco oni faras kaj konkurson kaj prezentadon de remado de drakboato. Inter la drakboatoj de Ĝuangdong la plej granda por 70-80 remantoj longas je pli ol 30 metroj kaj la plej malgranda similas al nuna konkursa vetboato, por nur kvar remantoj. La konkurson akompanas muzikado, tamburado kaj krakado de petardoj.

De la lastaj jaroj pli kaj pli vigliĝas tiu tradicia aktivado. En la tuta provinco aperis altnivelaj drakboataj teamoj. En la pasinta jaro dufoje okazis en Hongkong internacia konkurso de drakboatoj. En la konkurso partoprenis fortaj remantoj el iuj landoj de Eŭropo, Ameriko kaj sudorienta Azio, tamen la ĉampionejoj kaj subĉampionejoj estis gajnitaj de kamparanoj de Dongĝuan- kaj Ŝunde-gubernioj de la provinco Ĝuangdong. En la ĉi-foja tutlanda konkurso kamparanoj el Ŝunde-gubernio reprezentantaj la pro-



Rigardantoj

vincon Gŭangdong gajnis la ĉampionecon.


La konkurso partoprenis en la nomo de Fuĝjan-provinco la Fuĝoŭ-a Drakboata Teamo el fiŝistoj kaj surakvaj transportistoj

kaj gajnis la provincan ĉampionecon post konkursado.

Fuĝoŭ-anoj faras tian remadon ĝenerale en la 5-a de kvina monato laŭ la luna kalendaro. En tiu tago, ĉiujare, al la riverbordoj

oni venas kun siaj geavoj ŝancelpaŝantaj kaj infanoj en la brakoj por rigardi la spektaklon aŭ sur alta teraso aŭ sur balkono de etaĝdomo. Eĉ elmigrintaj ĉinoj revenintaj por viziti sian hejmlon

Antaŭ la komenco de konkurso





Strebu antaŭen!

kon nepre deziras ĝui la spektaklon.

Se en nombro la drakboatoj de Gŭangdong okupas la unuan lokon en la lando, la drakboatoj de Siĉŭan — la unuan lokon en beleco kaj delikateco. Oni povas diri, ke ĉiuj drakboatoj estas belegaj artaĵoj. Ne nur la remrapideco, sed ankaŭ la formo kaj beleco de drakboato estas prijuĝataj en la konkurso.

La Siĉŭan-a Drakboata Teamo, kiu gajnis la trian lokon en la konkurso, konsistis el laboristoj kaj oficistoj de la Utongĉjaŭ-a Salfarejo.

Utongĉjaŭ estas urbeto kun 200 000 loĝantoj. Tie la konkurso de drakboatoj havas multe da disciplinoj kaj estas tre amuza: Ili estas 500-metra rapidremado kaj 2 000-metra remado en nokto, konkurso pri formoj de koloraj drakboatoj kaj konkurso por kapti anason. En ĉiuj tiuj konkursoj la teamo de la salfarejo gajnis

ĉampionecon en sinsekvaj jaroj.

Apartajn karakterizaĵojn havas ankaŭ la konkurso de drakboatoj en la regiono de Ŭanŝjan-gubernio, Siĉŭan. La tiea konkurso okazas ĝenerale en Jangzi-rivero. Pro la torenta rivero kaj grandaj ondoj, ĉiuj drakboatoj havas pintan fundon. Dum konkursado ĉiuj boatoj prenas malsamajn ordonflagojn kiel siajn markojn. La speciale faritaj vestoj kaj ĉapoj de la remantoj harmonias kun la drakboatoj. Krom tamburantoj, estas ankaŭ alia, kiu, starante sur la pruo, kun ordonflago en la mano kriadas, por kuraĝigi la remantojn. Kiam ili atingas la cellokon, tiuj, kiuj kaptas flagon aŭ anason, estas venkintoj.

La drakboata teamo de Junnan-provinco konsistis el 26 tajaj kamparanoj venintaj el ambaŭ bordoj de Lancang-rivero.

La drakboatoj de tajoj estas luksaj. La draka kapo ĉe la pruo

longas je du metroj, skulptita el malmola ligno kaj kun du longaj dentoj. Dum konkursado, ili veturis ne laŭ la fluo malsupren, sed transveturis Lancang-riveron kun flurapideco de pli ol tri metroj ĉiusekunde. Tial ĉe la pruo de la boato 3-4 fortaj viroj firme tenas la drakan kapon per la manoj kaj en akompano de gongado takte premas la pruson, por ke la drako tranĉu la ondojn ĉe sia kapbalancado. Kaj ĉe la poŭpo de la boato 5-7 junuloj stiras la boaton, alie ĝi devias. Dume ankaŭ junulinoj en belaj vestoj stiras buntajn drakboatojn kaj partoprenas la konkurson. Ĝenerale tiu aktivado daŭras du-tri tagojn. Pere de tio gejunuloj povas elekti amat(in)on por si.

La remantoj de la junnan-a teamo ne sukcesis en la konkurso, pro tio, ke ili ne alkitimiĝis al tieaj manĝaĵoj kaj ne havis sperton por lerte stiri la boatojn antaŭe ne uzitajn.

ĜANG ĈINGĜEN:

VIGLAJ ĈINAJ VIRINOJ

LA ĉinaj virinoj estas laboremaj, modestaj, inteligentaj kaj kompetentaj. Ili ludas gravan rolon en industrio, agrikulturo, scienco, tekniko kaj aliaj kampoj. Multaj el ili laboras kiel gvidantoj de diversaj niveloj.

LERTAJ LABORULOJ

La ĉinaj virinoj portas gravan respondecon konstrui sian landon kune kun la viroj. Ili laboras en diversaj fakoj de malpeza industrio, tekstila industrio, edukado, kulturo, sanprotekto, financoj, komerco, maŝina industrio, petrokemia industrio, agrikulturo, forstado, akvoutiligo, scienca esplorado, fundamenta konstruado, fervojo, poŝto kaj telekomuniko, transportado ktp.

Multaj el ili atingis okulfrapajn sukcesojn. En 1959, 796 virinoj ĉeestis la Tutlandan Konferencon de Labormodeloj. En 1979, 104 virinoj estis honoritaj de la Ŝtata Konsilantaro per la titolo tutlanda labormodelo. Ili konsistigis 18% de la totala nombro de la labormodeloj de la tuta lando. En 1960, 1979 kaj 1983, la Ĉina Virina Federacio honoris 30 000 elstarajn virinojn per la titolo ruĝflaga tenanto.

MASTROJ DE LA KULTURO

De la lastaj jaroj la klereco de la ĉinaj virinoj rimarkinde altiĝis. Senĉese multiĝas lernantinoj de diversaj lernejoj. La studentinoj konsistigas 26.7% de la totala nombro de la studentoj en la tuta lando; esplor-studentinoj konsis-



Kang Keĉing, prezidantino de la Ĉina Virina Federacio, akceptas membrojn de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo.

tigis 14% de la totala nombro de la esplor-studentoj.


La virinoj konsistigas 30% de la totala nombro de la lernantoj en la oficist-laboristaj lernejoj kaj kursoj funkciigataj de entreprenoj. En 1983, 23.4 milionoj da oficistinoj kaj laboristinoj lernis en la kulturaj kursoj funkciigataj de laboristaj sindikatoj. Iuj el ili akiris rimarkindan sukceson en la lernado. Ekzemple, Ŭang Suhŭa, 38-jara laboristino de Hubej-provinco, estas tre lernema en la fabriko. En 1984 ŝi gajnis la unuan lokon en la "Konkurso pri Akiritaj Scioj", kiun partoprenis 1.03 milionoj da oficistoj kaj laboristoj de la tuta lando. La konkurso

estis iniciatita de "Laborista Ĵurnalo". La ekzamenatoj devis respondi 290 demandojn pri en-kaj eksterlandaj, antikvaj kaj nuntempaj astronomio, geografio, historio, literaturo, kurantaj aferoj, politiko, scienco kaj tekniko.


Post la starigo de la sistemo de akademaj titoloj en 1982, Ĉinio jam havis 830 doktorinojn kaj magistrinojn.

VIVAJ FORTOJ DE LA SCIENCISTA KAJ TEKNIKISTA VICARO

Natursciencistinoj laboras energie en la kampo de la ĉina scienco kaj tekniko. En 1983,



*Ĉina baletistino
Ŭang Janping*



*Sciencistinoj
en laboratorio*

Ĉinio havis 1.99 milionojn da sciencistinoj kaj teknikistinoj, el kiuj altklasaj inĝenieroj, profesoroj, vicprofesoroj, esploristoj kaj vicesploristoj konsistigis 11.5%

de la totala nombro de la altklasaj fakuloj.

Antaŭ 1982, inter la membroj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, la plej alta organizaĵo de la ĉina natura scienco, estis nur unu virino — Lin Ĉjaŭĝi, ginekologo pri obstetriko. Nun, 15 virinoj ricevis tiun akademian titolon. Krome, iuj fakulinoj fariĝis gravaj gvidantoj. Fizikistino Ŝje Ŝjide fariĝis rektoro de Fudan-universitato. Estas virinoj la estroj de la Pekina Ginekologia kaj Obstetrika Hospitalo, la Pekina Pediatria Hospitalo, la Aŭtomata Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, la Ŝanhaja Entomologia Instituto kaj la Paleovertebrula kaj Paleoantropologia Instituto. Je Ŝuhŭa estas la unua ĉinino laboranta kiel estro de la Ŝanhaja Observatorio.

Estas aparte menciinde, ke 49-jara Li Hŭamej estas la unua ĉina sciencistino, kiu faris esploradojn en la Antarkta Oceano 32 tagojn en 1983. Venkinte malbonan veteron kaj multajn malfacilaĵojn, ŝi bone plenumis sian taskon, kolektis multajn specimenojn kaj kaptis valoregajn fotojn. Ŝi eĉ naĝis en frosta maro de la Antarkta Oceano kaj gajnis medalon de la Naĝklubo de la Novzelanda Reĝa Fanda-stacio.

ELSTARAJ SPORTISTINOJ EN LA MONDO

En la 35 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ĉinaj sportistinoj gajnis 60 mondĉampionecojn, kiuj konsistigis 37% de la totala nombro de la mondĉampionecoj gajnitaj de ĉinaj sportistoj. Precipe, de 1981 ĝis julio de 1983, 54 sportistinoj fariĝis mondĉampionoj, kiuj konsistigis 56.8% de la totala nombro de la ĉinaj mondĉampionoj. Inter ili gimnastino Ma Janhong gajnis la unuan mondĉampionecon por

la Ĉina Virina Gimnastika Teamo. En 1981, la Ĉina Virina Pafa Teamo gajnis la unuan teaman mondĉampionecon por Ĉinio. Pafistino U Lanjing gajnis la unuan individuan mondĉampionecon. En 1983, la Ĉina Virina Marŝa Teamo gajnis la unuan teaman mondĉampionecon por la Ĉina Atletika Teamo. Marŝistino Ŝju Jongĝiŭ fariĝis la unua individua mondĉampionino, inter la ĉinaj marŝistoj. En 1983, Li Jongĝong gajnis la unuan mondĉampionecon por la Ĉina Virina Paraŝuta Teamo. En 1984, Lŭan Ĝjuĝje fariĝis la unua mondĉampionino de la virina arta skermado.

EN POLITIKA POTENCO

En septembro de 1949, kiam inaŭguriĝis la unua Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kiu portempe funkciis kiel la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso (kiel parlamento), ĝin partoprenis 69 virinoj, kiuj konsistigis 10.6% de la totala nombro de la partoprenantoj. En la unua Ĉina Tutlanda Popola Kongreso, kiu okazis en 1954, la reprezentantinoj konsistigis 12 de la reprezentantoj. Poste, la nombro de la reprezentantinoj senĉese grandiĝis. En la sesa Ĉina Tutlanda Popola Kongreso okazinta en 1983, la nombro de la reprezentantinoj kreskis al 21.2% de la totala nombro de la reprezentantoj. Ankorau pli da reprezentantinoj troviĝas en bazaj kaj guberniaj popolaj kongresoj.

En nia Ŝtata Konsilantaro laboras 11 ministrinoj kaj vicministrinoj. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio estis nur du vicprovincestrinoj tutlande, sed nun, la nombro kreskis al sep. En 1983, Gu Ŝiŭljan fariĝis estrino de Ĝjangsu-provinco. Ŝi estas la unua provincestro de Ĉinio.

KURANTAJ AFEROJ

HIDROELEKTREJO KONSTRUOTA ĈE LA TRI MONTGORĜOJ DE JANGZI-RIVERO



Ĉinio konstruos grandan hidroelektrejon ĉe la Tri Montgorĝoj de la rivero Jangzi, kun generatorkapacito de 13 milionoj da kilovattoj.

La Tri Montgorĝoj situantaj inter Fengĝje de Siĉuan-provinco kaj Jiĉang de Hubej-provinco estas belaj kaj imponaj turismaj vidindaĵoj. La krutaj rokmuroj de la montoj kaj la torentegaj fluoj dotis la lokojn per favoraj kondiĉoj por konstrui hidroelektrejon. Ĉinio bonvenigas, ke aliaj landoj kunlaboros kun ĝi por konstrui la hidroelektrejon per liverado de tekniko, ekipaĵoj aŭ investado de kapitaloj.

POŝTA-TELEKOMUNIKA MINISTERIO PLIBONIGAS SIAN SERVON EN LA MALFERMITAJ URBOJ

Laŭ plano la Ĉina Poŝta-Telekomunika Ministerio helpas la 14 marbordajn malfermitajn urbojn kaj specialajn ekonomiajn distriktojn instali avangardan aŭtomatan ciferan telefonreton programregatan kaj finos la instaladon antaŭ la fino de 1986.

*La plej granda ĉina aŭtomata
telefoncentralo en Tjanĝin*



*Lanĉo de la elektrizita fervojo
inter Ĉengdu kaj Neĵĝjang*

Nun la programregata telefonreto en la urbo Fuĝoŭ jam ekfunkciis. Tia telefonreto en la urboj Daljan, Ĉinhŭangdaŭ, Jantaj kaj Ĉingdaŭ estas en streĉa instalado. La ceteraj urboj plimultigos long-distancajn duonaŭtomatajn ekipaĵojn kaj longdistancajn komunikajn liniojn por levi sian komunikan povon.

En ĉiuj specialaj ekonomiaj distriktoj kaj malfermitaj urboj estis starigitaj telegrafiaj servoj por familioj en la fino de 1984.

REKORDA JARO DE AŬTOPRODUKTADO

En 1984 Ĉinio produktis 300 000 aŭtojn, je 25% pli multe ol en 1983, kaj samtempe la profito kreskis per 27%.

Kvankam la produkta plano kaj la efektiva produktokvanto senĉese leviĝis kaj multaj aŭtofabrikoj jam venis al la limo de la produkta povo, tamen ili ankoraŭ ne povis kontentigi la bezonon de diversaj flankoj, kaj la aŭta merkato havas grandan lantentan forton.


Merkata antaŭtakso montras, ke la bezonataj aŭtoj en 1985 de la tuta lando kreskos de 350 000 en 1984 ĝis 500 000 kaj tiu de 1983 estis 250 000.

ELEKTRIZITA FERVOJO EN SIĈUAN

Jam plenumiĝis la elektrizado de la 219-kilometra fervojo de Ĉengdu ĝis Neĵĝjang en Siĉuan-provinco. La jara transporta povo de la elektrizita fervojo leviĝis je 2 830 000 tunoj kaj tio multe moderigis la malfacilan staton de transportado sur la Ĉengdu-Ĉongĉing-a Fervojo.

GRANDA DISVOLVO DE MALGRANDAJ HIDRO- ELEKTREJOJ EN ŜINCANG-GUBERNIO

En Ŝinĉang-gubernio, Ĝeĝjang-provinco, unu el la eksperimentaj gubernioj de elektrizado en la ĉina kamparo, jam funkcias 217 mezgrandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj, kiuj produktas 75 030 000



Hidroelektrejo en Sinĉang-gubernio, Geĝjang-provinco

kilovattorojn da elektro jare, t.e. ĉiu loĝanto en la gubernio disponas ĉirkaŭ 200 kWh.

KANCERA GENO TROVITA EN ĈINIO

Ĉinaj medicinaj esplorantoj trovis kanceran genon kaŭzantan primaran hepatan kanceron al homo.

Fama sovetia tenorulo Juri Marusin



Tiuspeca kancera geno, nomata N-Ras, estas trovita de grupo da sciencistoj sub Gu Ĝjanĝen, profesoro de la Ŝanhaja Tumor-esplora Instituto, en kancera hepato kaj kanceraj ĉeloj de homo. Specialistoj opinias, ke la trovo estas grava rompo en esplorado de hepata kancero kaj multe helpas en esplorado, diagnozo kaj kuraco de hepata kancero en Ĉinio.

SUKCESOJ EN UNIVERSALIGO DE EDUKADO KAJ ELIMINADO DE ANALFABETECO EN ĈINIO

Nun en Ĉinio ĉirkaŭ 600 gubernioj universaligis primaran edukadon kaj pli ol 93 procentoj de la lernojaraj infanoj vizitas lernejojn.

En la pasintaj kvin jaroj ĉirkaŭ 30 milionoj da ĉinoj ellernis legi kaj skribi, kaj la analfabeteco de junuloj kaj mezaĝuloj estis fundamente eliminata en pli ol 900 gubernioj.

Nun kamparanoj en diversaj lokoj de Ĉinio starigis dek milojn da elementaj, vesperaj kaj plenaĝulaj lernejoj. Por garantii glatan disvolvon de la eliminado de analfabeteco kaj universaligo de edukado diversaj lokoj faris deci-

dojn kaj regularojn. Ekzemple, iuj lokoj malpermesas geedziĝi al la junaj analfabetoj, rifuzas akcepti analfabetojn kiel laboristojn, monpunas la gepatrojn, kiuj ne lasas siajn infanojn viziti lernejojn ktp.

PLI OL 33 000 ĈINAJ LERNANTOJ EKSTERLANDE

De 1978 ĝis la fino de junio 1984 jam 33 000 ĉinoj lernis eksterlande, inter kiuj pli ol 26 000 lernantoj estis senditaj de la registaro kaj pli ol 7 000 lernis je sia kosto. Nun 14 000 lernantoj jam revenis la patrujojn, fininte sian lernadon.

ĈINAJ GEBALETISTOJ GAJNIS SPECIALAN PREMION EN PARIZO

Ĉinaj gebaletistoj Ŭang Ĉjifeng kaj Ŭang Cajĝjun gajnis specialan premion en la unua pariza internacia baleta konkurso, okazinta la 9-an de nov. 1984.

Tio estis la unua fojo por la ĉinaj baletistoj ĉeesti internacian baletan konkurson okazigitan en Eŭropo. Fakuloj laŭdis, ke ili ludis dupersonan dancon "Esmeralda" kun entuziasmo kaj granda lerteco, montrante naturan sorĉon. 45 baletistoj el 17 eŭropaj, aziaj kaj latinamerikaj landoj partoprenis en la konkurso.

SOVETIA TENORULO PREZENTIS EN PEKINO

Invitite de la Ĉina Kompanio por Eksterlanda Prezento, fama sovetia tenorulo Juri Marusin prezentis en Pekino la lastan novembro kaj gajnis ovacion de la aŭskultantoj. Akompanate de pianistino Elena Matoussovskaja, gajninto de internacia horora premio, Marusin, kiu gajnis orajn medalojn en tri internaciaj operaj konkursoj, ĝuigis la pekinajn aŭskultantojn per prezento de rusaj popolkantoj kaj operaj pecoj de Ĉajkovskij, Verdi kaj aliaj.

JANŝIU-GARDENO GAJNIS ORAN PREMION EN LA INTERNACIA ĜARDENA FESTIVALO

Janŝiŭ-ĝardeno konstruita de pekinaj ĝardenistoj gajnis per sia partikulara arta stilo grandan oran premion en la foiro de ĝardenaj verkoj de la internacia ĝardena festivalo en 1984, kaj ankaŭ la premion de la eterne konservebla plej bona arta plastiko kaj premion de la plej bona kiosko.

Tiu ĉi foiro okazis en Liverpolo, Britio, kun partoprenantoj el 30 landoj. Estis la dua fojo por Ĉinio ĉeesti tian foiron kaj la unua fojo por ĝi tie eksponi nordan kortegan ĝardenon. La ĝardeno kun areo de nur 800 kvadrataj metroj konsistas ĉefe el unu kiosko, unu koridoro kaj groteskaj naturaj rokpecoj.

Post la foiro Janŝiŭ-ĝardeno estis donacita al la liverpola popolo en la nomo de la ĉina popolo.

SVATAGENTEJO POR BLINDULOJ KAJ SURDAMU- TULOJ EN ĈINIO

La ĉina unua svatagentejo por blinduloj kaj surdamutuloj en Ŝanhajo estas multe petata de surdamutuloj el diversaj lokoj de la lando, ke ĝi helpu ilin trovi kunulojn.

La svatagentejo fondiĝis en julio, 1984, kaj nun jam helpis 16 svatiĝantojn el pli ol 70 petantoj.

La pli ol 70 petantoj en aĝoj de 27-51 jaroj preskaŭ ĉiuj laboras en bonstatigaj fabrikoj fonditaj de la registaro.

Ĉ. 24 000 el la 11 milionoj da loĝantoj de Ŝanhajo estas blinduloj kaj surdamutuloj. La plejparto el ili sin vivtenas per sia laboro. En Nanŝi-kvartalo du kvinonoj el la 280 edziĝtaŭgaj blinduloj kaj surdamutuloj jam geedziĝis.

ANTI-KVA URBETO TONGLI MALFERMITA AL TURISTOJ

Tongli, antikva urbeto en

Ĝjangsu-provinco, konata kiel "Muzeo de Arkitekturo de Ming-kaj Ĉing-dinastioj (1368-1911)", jam akceptis 100 000 turistojn eksterlandajn depost la malfermo en la unua duono de la jaro 1984.


Tongli estas la unua urbeto unuo de kulturaj restaĵoj protektata de la registaro en Ĉinio.

Tongli estas ĉirkaŭita de lago, 26 kilometrojn sudoriente de la pitoreska urbo Suĝoŭ, kun areo de 0.67 kvadrata kilometro. 15 riverejoj dividas ĝin en 7 pecojn, tamen ilin denove kunligas 29 antikvaj ŝtonaj pontoj.

La urbeto havas 2 500 familiojn, kies domoj staras ĉe akvo. La domoj havas altajn tegmentojn kaj vastajn kortojn, kie kreskas antikvaj arboj. Nun la plankareo de la antikvaj konstruaĵoj konsistigas 40% de tiu de la kontraŭaĵoj en la urbeto.



Janŝiŭ-ĝardeno kaj ĝia ĉefprojektilo Li Ĝimin



BELA ŜJIGAZE

de ŬANG ŜJANGKUN

ŜJIGAZE, la dua granda urbo de Tibeto, situas sur delto je 3 800 metroj super la marnivelo, 340 km. sudokcidente de Lhaso, antikva urbo sur altebenaĵo. Ĝi kun historio de pli ol 700 jaroj estas grava loko sur la altebenaĵo. Norde ĝi apudas al la rivero Jarlung Zangbo kaj oriente frontas al Njanĉu-rivero. Tie la medio estas bela, danke al prosperaj arbaroj kaj herbejoj.

En la historio la vasta regiono kun 300 000 kvadrataj kilometroj en la supra baseno de la rivero

*Sciencistoj de la Agronomia
Instituto de Ŝjigaze*



Jarlung Zangbo estis nomata Malantaŭa Tibeto. En Ŝjigaze troviĝis loĝejo de ĉiuj Banĉan-lamaoj. La urbo estis politika kaj religia centro de la Malantaŭa Tibeto, kaj tie troviĝas la sidejoj de la Popola Registaro de la gubernio Ŝjigaze kaj Administrejo de la subregiono Ŝjigaze.

La templo Ĝaŝilunbu, je 2 km. okcidente de Ŝjigaze, estas unu el la famaj Gelu-skolaj temploj.

La templo kun areo de 300 000 kvadrataj metroj ĉe la monto rigardas suden. Ĝiaj konstruaĵoj kovris 30 000 kvadratajn metrojn da tero. La 57 sutro-haloj kaj pli ol 6 000 ĉambroj, kies muroj estis ruĝe kaj blanke kolorigitaj, formas harmonian tuton. Rigardate de malproksime ĝi aspektas tre impone. Tiu strikta domaro estas starigita de Gengdunĝuba, Dalai-lamao la Unua, disĉiplo de majstro Congkapa. Dum la regado de Lŭosang Ĉiŭĝjijŭancan, Banĉan la Kvara (1567 — 1662), oni faris la plej grandskalan plivastigon. Dank' al la plurfoja konstruado fare de la pasintaj Banĉan-lamaoj ni povas vidi la nunan templon.

La Granda Sutra-halo estas la plej frua konstruo en la templo. Dum la pli ol 500 jaroj de ĝia naskiĝo tiu pilgrimata templo estas konservita sendifekta. Antaŭ ĝi kuŝas sutropredikejo kun 500 kvadrataj metroj. Ĝi estas loko, kie Banĉan-lamaoj predikis al la bonzoj de la tuta templo kaj loko, kie la bonzoj faris debatojn.

En la Granda Sutra-halo kun orita pinakleto sur la tegmento estas multaj longtempaj freskoj pri budhoj. Okcidente de la halo estas alia halo, kie en la centra niĉo pendas giganta portreto de imperiestro Ĉjanlong de Ĉing-dinastio. La portreto estas donaco de Ĉjanlong al Banĉan la Sesa, kiam ĉi tiu partoprenis en la celebra soleno por la 70-a datreveno de la naskiĝo de Ĉjanlong.


Flanke de la halo kun portreto de imperiestro Ĉjanlong estas salono, destinita por renkontiĝo de delegita ministro de Ĉing-dinastia kortego kaj Banĉan-lamao. Ĉiuj imperiestraj dekretoj estis legataj de la delegita ministro al Banĉan-lamao en la salono. Ĉiufoje, kiam Banĉan ricevis la dekreton, li adorkliniĝis antaŭ la portreto de Ĉjanlong por esprimi sian dankon kaj post tio interparolis kun la ministro. Nun la salono konservas la originan dekoracion. En la apuda eksponejo konserviĝas donacoj de imperiestroj al Banĉan-lamaoj.

La halo Granda Ĉjangba, en la okcidenta parto de la templo Ĝaŝilunbu, estis ekkonstruita de Tuding Ĉiŭĝjinima, Banĉan-lamao la 9-a, en 1914 kaj finkonstruita post kvar jaroj. La 7-etaĝa halo estas 30 metrojn alta. Tie staras 26.2 metrojn alta orita latuna budho, unika en Ĉinio. Por la budha statuo oni konsumis 115 500 kg. da kupro, 279 kg. da oro kaj pli ol 1 400 brilantojn, perlojn kaj sukcenajn bidojn sole por fari la brovojn.

Same kiel aliaj gravaj temploj, Ĝaŝilunbu estas ĉiam protektata de la ŝtato. En la templo vivas 571 lamaoj, inkl. de 7 vivaj budhoj. La religiaj kultadoj iras kiel kutime. Ĉiujare ĝin vizitas kaj pilgrimas ĉ. 200 000 homoj, inkl. de gastoj el dekelkaj landoj.

Sude de Ĝaŝilunbu je unu kilometro sidas nova Palaco de Banĉan Erdini. Tie estis palaco de Banĉan-lamaoj de ĉiuj generacioj. Poste ĝi disfalis. En la 50-aj jaroj la ŝtato konstruis ĝin malantaŭ la ruino de la malnova palaco samtempe kun starigo de Lobu-parko kaj nova palaco por Dalai-lamao en Lhaso. La nova palaco havas vastan kaj helan akceptejon en la unua etaĝo, ĉambraron de Banĉan Erdini en la dua etaĝo kaj sutro-predikejon en la tria etaĝo. Ĉiuj ŝtuparoj estas inkrustitaj per latuno kaj kovritaj per ruĝaj tapiŝoj. Sur la muroj pendas belkoloraj pentraĵoj.

La balkono de la nova palaco ebligas havi delectan birdvidon al la tuta urbo. Oni diris, ke dum la regado de la feŭda servuta sistemo ĉie regis kadukeco en Ŝjigaze. Ĉe la Paca Liberigo de Tibeto en 1951 Ŝjigaze havis nur 6 000 loĝantojn escepte de la lamaoj en la templo Ĝaŝilunbu. Tiam la urbo okupis malpli ol unu kvadratan kilometron, kie staris domoj kun konstrua areo nur de 150 000 kvadrataj metroj, plejparto el kiuj estis malaltaj kaj malhelaj terbudoj. En la urbeto estis nur zigzagaj malebenaj kavoplenaj vojetoj. En sunaj tagoj polvo baris la lumon kaj en pluvaj tagoj kotigis la vojetoj. Sur stratoj vagadis almozpetantoj en ĉifonaĵoj kaj malriĉuloj marasmaj. Dank' al la Paca Liberigo Ŝjigaze adiaŭis malriĉecon. Turistoj, kiuj vizitis ĝin antaŭ 30 jaroj, nun senescepte admiras ĝian gigantan ŝanĝigon. Nun Ŝjigaze havas



Parto de la hidroelektrajo Tanghe



Tibet-naciaj veterinaroj

30 000 loĝantojn kaj areon de 4 kvadrataj kilometroj. Tie la domoj 4-5-obliĝis kompare kun tiu antaŭ la liberigo. Sude de la malnova urboparto aperis nova distrikto kun 5 movoplenaj stratoj, kies totala longeco atingis 20 kilometrojn.

En 1979 oni konstruis tie hidroelektrajon Tanghe, dank' al kio la elektrolampoj anstataŭis olelampojn kaj kandelojn en la

tibetanaĵoj. La kran-akva sistemo, al kiu la ŝtato investis 2 400 000 jŭanojn, havas nun 5-kilometran tubaron, komenciĝis akvolivero ekde la 1-a de oktobro 1984. Nun pli ol 60% de la urbanoj uzas kran-akvon. Nun Ŝjigaze-hotelo, ĉiovendejo kaj domo de la Ambulatorio de la Subregiona Popola Hospitalo, Sunenergia Eksperimenta Stacio kaj Popola Arta Halo kaj aliaj gravaj



*Tibet-naciaj muzik-
amantoj*

konstruaĵoj monhelpataj de la ŝtato estas rapide konstruataj, kiuj plenumiĝos en 1985.

En Ŝjigaze, kie en la pasinteco troviĝis neniam modernaj industria entrepreno kaj trafiko, nun aperis dekoj da mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj karbo-industria, leda kaj domkonstrua, elektrejo, presejo, aŭtoriparejo, grenprilaborejo, farmacia fabriko kaj aŭtotransportado kun preskaŭ 2 000 laboristoj kaj oficistoj, el kiuj 75% estas tibetanoj. La ŝosea trafiko ligas Ŝjigaze kun la 19 gubernioj de la subregiono kaj landlimaj punktoj. De tie la ŝoseo kondukas orienten al Lhaso kaj okcidenten al Ali, la tegmento de Tibeto. La Ĉina-Nepala Amikeca Ŝoseo iras tra Ŝjigaze. Ĝi estas grava trafika linio por kunligi Ĉinion kaj Nepalon.

En la periodo de la feŭda servuta sistemo Ŝjigaze havis nur unu oficialan elementan lernejon kun 40 lernantoj, kiuj estis senescepte infanoj de nobeloj, altranguloj kaj riĉuloj. Krome, tie funkciis ankaŭ 3-4 privataj lernejoj, kiuj havis nur pli ol 30 lernantojn. Post la Paca Liberigo de Tibeto la ŝtato donis grandan atenton al la nacia edukado de la tibeta popolo. En 1953 Ŝjigaze

ekhavis sian unuan novtipan elementan lernejon kun pli ol 300 geknaboj. Nun en Ŝjigaze funkcias 4 mezlernejoj, kie lernas ĉ. 1 500 lernantoj, kvar elementaj lernejoj kun 2 600 lernantoj. Nun tie pli ol 90% de la lernojaraj infanoj vizitas lernejon.


Antaŭ 1951 en Ŝjigaze, kie loĝis 10 000 loĝantoj inkl. de lamaoj en la templo, estis nur unu malgranda tibet-medicina kuracejo en la templo Ĝaŝilunbu. Tiam preskaŭ en ĉiu kvina jaro, aŭ maksimume deka jaro la urbeton atakis pesto. En 1952 la Popola Liberiga Armeo de Ĉinio eniris en Ŝjigaze. La arma medicina taĉmento tie starigis la unuan eŭrop-medicinan kuracejon. Post tio la ŝtato sendis tien aron da eminentaj kuracistoj de Pekino, Ŝanhajo, Siĉŭan kaj aliaj lokoj. Nun en Ŝjigaze estas subregiona popola hospitalo, subregiona tibet-medicina hospitalo, gubernia popola hospitalo, subregionaj epidemi-preventa stacio, farmacia fabriko kaj higiena lernejo, kaj 18 klinikoj sub oficejoj, fabrikoj kaj aliaj entreprenoj. En Ŝjigaze estas 270 malsanulaj litoj kaj 530 higienaj laborantoj, el kiuj pli ol 80% estas tibetanoj. Tie ĉiuj tibetanoj estas kuracataj senpage. Dum la pli ol 30 jaroj post la Li-


berigo tie neniam furiozis epidemio.

Ambaŭflanke de la ŝoseo inter la nova kaj malnova distriktoj estas prospera komerca distrikto, kie koncentriĝis magazeno, eksterkomerca domo, vendejo de naciaj produktaĵoj kaj apoteko. En la Granda Popola Halo kun pli ol 2 000 sidlokoj, oni povas rigardi filmojn en ordinaraj tagoj kaj tibetajn operojn kaj dancojn en festotagoj. Ekde aprilo 1983 dank' al la nove starigita TV. transdissenda stacio la vivo de la loĝantoj ekhavis novan spicon. Nun nemalmultaj tibetanaĵoj hejmoj ekuzis koloran televidilon.

La metiarto de Ŝjigaze havas longan historion. Pro sia delikateco ĝi ĝuas altan renomon sur la Tibeta Altebenaĵo. Nun en Ŝjigaze funkcias 17 kolektiv-posedaj naciaj metiejoj kun 1 100 oficistoj kaj laboristoj, kaj plie granda parto de la loĝantoj sin okupas pri familia produktado. Nun ili povas produkti 400 — 500 specojn da varoj, sed en 1964 malpli ol 100 specojn. Nun ili produktas ĉefe feltajn kusenojn, vestojn, botojn, incenson kaj meblojn, oraĵojn, arĝentaĵojn, kupraĵojn, lignajn bovlojn, turismajn memoraĵojn ktp. La felta kuseno kun bela koloro kaj delikata desegno estas multe ŝatata de la tibetanoj. La bele gravuritaj oraĵoj kaj arĝentaĵoj estas tre valoraj metiartaĵoj.


Ekde 1980, kiam oni ekpraktikis la gravajn instrukciojn de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio al Tibeto, Ŝjigaze, hermetike fermita en la pasinteco, malfermis sian pordon al la mondo. En la lastaj jaroj vizitantoj kaj turistoj frekventis la urbon. De 1981 ĝis 1984 Ŝjigaze akceptis 4 700 person-fojojn da montogrimpantoj kaj turistoj de fremdaj landoj.





Latuna budho Ćjangba en la templo Gašilunbu

Foto de LIŮ TJEŠENG



La templo Gašilunbu

Foto de LIŬ TJEŠENG


1 *Halo kun portreto de imperiestro Ĉjan-long en niĉo*

Foto de ŜJE ĜJUN



2 *En festotago*

Foto de ŜJE ĜJUN



3 *Hejma teksado*

Foto de CAJ LONG



4 *Maljuna metiartisto pri oraĵoj kaj arĝentaĵoj*


Foto de ŜJE ĜJUN



1	2
3	4

Silkajoj de la Antikva Ĉinio

de FENG SJAŬ




*Verda brokato kun ok grupoj
simbolantaj longvivecon de
Ĉing-dinastio*



*Silkaj ŝuoj kun defor-
mitaj desegnoj de
Tang-dinastio*

*Arĝenta brokato
kun floraĵo de
Ming-dinastio*



LA silkaĵoj de la antikva Ĉinio estis ĉiam admirataj pro sia bunteca ĉarmo. Ili servis ne nur kiel materialo de vestoj por ĉinoj en diversaj periodoj, sed ankaŭ kiel grava eksportaĵo de la antikva Ĉinio. Jam frue en la dua jarcento a. K., tiaj silkaĵoj eksportiĝis tra la Silka Vojo (en la nunaj Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj Mez-Azio) en la okcidentan Azion kaj Eŭropon. La antikvaj Romanoj kaj Egiptioj rigardis ĉinajn silkaĵojn kiel rarajn kaj portadon de silkaj vestoj kiel gloron. Laŭ la notoj de la Eŭropa historio, la roma ŝtatestro J. Cezaro iam vizitis teatron en ĉina silka robo, kiu ravis la tutan spektantaron kaj estis rigardata kiel senprecedenca lukso. Komercistoj de multaj landoj okupiĝis pri la negoco de ĉinaj silkaĵoj,

tiam unu funto da silkaĵo kostis 12 uncojn da oro. Eĉ post la 13-a jarcento la ĉinaj silkaĵoj havis ankoraŭ grandan debiton en la okcidenta merkato.

Almenaŭ antaŭ 5 000 jaroj, Ĉinio jam komencis produkti silkaĵojn. En 1958 oni elterigis silkaĵojn el ruino de malfrua neolitiko de Ĝeĝjang-provinco, inter ili troviĝis silkaj ŝtofpecoj, rubandoj kaj fadenoj. En multaj neolitikaj ruinoj de Ĉinio oni trovis grandan kvanton da ceramikaj aŭ ŝtonaj teleroj rondaj, ĉiu havas truon en la mezo, en kiun estas tredita stangeto. Antaŭ ol ŝpini, oni unue kuntordis tufon da silkaj fibroj kaj volvi ĝin ĉirkaŭ la stangeto, poste per unu mano tenis la stangeton kaj per la alia turnadis la teleron por longigi kaj

kuntordi plu la fibrojn. Kiam la kuntordita silko atingis certan longecon, oni devis volvi ĝin ĉirkaŭ la stangeto. Ĝi estis la plej primitiva ŝpinado de Ĉinio. Antaŭ 4 000 jaroj oni jam inventis varmakvan kokon-elbobenadon.

En la skribaĵoj sur ostoj kaj testudaj krustoj de Ŝang-dinastio antaŭ pli ol 3 000 jaroj troviĝas pli ol cent ideografiaĵoj kun elemento “糸” (la ĉinaj ideografiaĵoj plejparte formiĝas el du aŭ tri partoj, kunmetitaj paralele aŭ unu super alia), kies signifo rilatas kun silko. En la Periodo de Militantaj Regnoj (475 a.K. — 221 a. K.), la silka teksarto de Ĉinio multe disvolviĝis kaj la silkaĵoj estis sufiĉe delikataj. La tiamaj silkaj ŝtofoj havis du specojn: simpla ŝtofo kaj kepra

Vesto el silka gazo de la Okcidenta Han-dinastio



ŝtofo. Oni povis elfari silkan ŝtofon kun geometriaj desegnaĵoj aŭ plurkoloraj konveksaj desegnaĵoj. La apero de ŝtofo kun konveksaj desegnaĵoj estis granda progreso en la teksarto. Tio ne nur riĉigis kaj disvolvis la antikvan silk-teksarton de Ĉinio, sed ankaŭ multe influis la tekstilan teknikon de la mondo.

En la periodo de la dinastioj Ĉin kaj Han (221 a. K. — 220 p. K.), la silk-tekstila metiindustrio de Ĉinio grandege disvolviĝis. En la jaro 110 a. K., imperiestro Udi de Han-dinastio rekviziciis kvin milionojn da ruloj da silkaĵoj. Ĉinaj arkeologoj trovis, en Han-dinastia tombo ĉe Maŭangduj en antaŭurbo de Ĉangŝa de Hunan-provinco, veston el silka gazo, maldikan kiel cikada flugilo kaj pezan nur 49 gramojn. Krome, ili trovis ankaŭ brokatojn el malsamkoloraj silkoj. La brokatoj kun diversaj desegnaĵoj siatempe furorantaj estas tre belaj.

Inter ili estas vila silkaĵo, kiu estas ja rudimenta veluro.


Tang-dinastio (618 p. K. — 907 p. K.) estis grava periodo de la ĉina silkaĵa disvolviĝo. Tiam nur riĉulo He Mingjŭan de Dingĝoŭ (la nuna Ĝengding-gubernio de Hebej-provinco) havis 500 silkajn teksilojn. 700 teksistoj kaj brodistoj laboris speciale por liveri belajn silkaĵojn al Jang, la supera kromedzino de la imperiestro. Dank' al la pliperfektigo de desegnaĵ-brokata teksilo estiĝis grandkvante silka brokato kun veftaj desegnaĵoj, tiel ke ŝanĝiĝis la situacio antaŭ Tang-dinastio, en kiu oni faris teksaĵon ĉefe kun varpaj desegnaĵoj. La ŝtofo de paro da brokataj ŝuoj faritaj en 778 p. K., elterigita en Astala de la Ŝingĵang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, estas teksita per okkoloraj silkaj fadenoj kaj havas desegnaĵojn en komplika kaj delikata strukturo kaj kun vivecaj figuroj sur si.

En Song-dinastio (960-1279 p. K.) silk-teksaj metiejoj troviĝis ĉie en la urboj kaj kamparo de suda Ĉinio. Siĉŭan-provinco kaj la delto de Jangzi-rivero fariĝis regionoj, kie prosperis la silk-teksa metiindustrio. La valoraj brokatoj de Siĉŭan estis liverataj ne nur al la kortego, sed ankaŭ al eksporta komerco. La metiistoj brokis silkajn teksaĵojn per diversaj floraĵoj, herboj, pejzaĝoj kaj figuroj de birdoj, bestoj kaj homoj kun harmonia koloraranĝo.

La silka tekstilado rapide disvolviĝis en la dinastioj Ming kaj Ĉing (1368-1911). La ŝpiniloj kaj teksiloj estis pluaparte plibonigitaj, novaj pedalaj radŝpiniloj, du-fadenaj aŭ tri-fadenaj permanentaj radŝpiniloj levis laborproduktivecon. Tiam silk-teksaj centroj koncentriĝis en Ĝjangning, Kantono kaj Foŝan. En Kantono sin trovis jam 40 000 teksistoj. En la komenca periodo de la 19-a jarcento, Nankino havis pli ol 30 000 teksilojn, ĉiu konsistis el 132 pecoj kaj povis tiri 9 000–17 000 varperojn.

Tiam la teksarto de silka ŝtofo kun desegnaĵoj en Ĝjaŝing kaj Huĝoŭ de Ĝeĝjang-provinco estis la plej altnivela en la tuta lando. La desegnaĵoj de silkaj brokatoj fariĝis pli belaj kaj havis pli altan nivelon de arto. Estis oficiale destinitaj la ebena, kepra kaj satena teksartoj de la nuna tekstilado. La silka teksarto antaŭ Tang-dinastio kombiniĝis kun la nova satena teksarto. Dank' al tio aperis nemalmultaj novaj specoj de silkaĵoj, inter kiuj plejparto ĝis nun ankoraŭ restas tradiciaj produktaĵoj kaj havas grandan debiton en ĉiuj partoj de la mondo.

Antikva teksilo (Ilustraĵo el ĉina antikva literaturo)





Bonkora Ŝjaudon

NOVAJ KOLORAJ INFANLIBROJ

eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

BONKORA ŜJAUDON

Bildrakonto pri ujugura knabo Ŝjaudon, kiu sagace savis homon kaj bestojn. La rakonto montras ankaŭ, kiel li sukcese evitis kruelan punon de aroganta reĝidino.

KOLORIGU

Serio de ses kajeroj pri diversaj bestoj kaj floroj. Por ĉiu besto aŭ floro estas du bildoj: unu kolora kiel modelo, kaj la alia nigra-blanka, sur kiu infano povas kolorigi.

Formato: 183×206mm. 120 pĝ.

Prezo: £2,90 US\$ 5,90

Numero: 88-Es-205P

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPĈ

aŭ Internacia Libro-Komerca
Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN),
Esperanta Sekcio,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio


Formato: 183×206mm. 60 pĝ.

Prezo: £1,10 US\$ 2,30

Numero: 88-Es-204P



LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. *Sijgaze*
2. *Daljan*
3. *Zŭojun-gubernio de Ŝanŝji-provinco*
4. *Lŭojang*
5. *Foŝan*



Taoistoj en preĝado

LI ĈJANG:

MILJARA TEMPLO DE ĈINA TAOISMO

TAOISMO estas religio origine evoluinta en Ĉinio kaj fontis el la antikvaj sorĉo kaj magio de Ĉin- kaj Han-dinastioj (221 a.K. — 220 p.K.) kaj la pensoj de Laŭzi kaj Ĝuangzi. Ĝis nun la religio daŭris jam pli ol 1 800 jarojn. La Ĉina Taoisma Asocio sidas en Bajjun-templo, en la sudokcidenta parto de Pekino. La templo estas la centro de esplorado de la ĉina taoismo kaj rito-farado de taoistoj.

La templo antaŭe estis Tjanĉang-templo konstruita antaŭ 1200 jaroj, en Tang-dinastio. Sed en 1202 la templo estis forbruligita kaj postrestis nur ŝtona statuo de sidanta Tajŝang Laŭĝjun. La statuo estas sendifekta dank' al bona konservado kaj nun eks-

poziciata en Bajjun-templo. La ŝtona Laŭĝjun kun longa barbo sidas kun la kruroj krucitaj kaj la manoj metitaj sur la genuoj. La versimila statuo estas unu el la valoregaj antikvaĵoj konservitaj de la taoistoj en la templo.

La templo estis rekonstruita en 1203 kaj poste plivastigita multfoje tiel ke ĝi fariĝis granda konstruo. La registaro de la nova Ĉinio donis grandan atenton pri la riparado kaj protektado de la templo. En 1956 la registaro asignis tricent mil jŭan-ojn (2.6 jŭanoj egalas al unu usona dolaro) por grandskala riparado de la templo. Ekde 1981 oni faris al la templo trijaran riparadon. La nunaj haloj de la templo aspektas des pli impone kaj pompe. Ekde

1982 la templo rekomencis taoismajn ritojn. Komence de 1984 la templo estis oficiale malfermita al la publiko, kaj multaj kultantoj kaj turistoj en- kaj eksterlandaj venis viziti la templon.

La nuna abato Liŭ Ĝiŭej estas asistanta ĝenerala sekretario de la Ĉina Taoisma Asocio. En la templo vivas tridekkelkaj taoistoj, el kiuj nur kelkaj estas maljunaj kaj la ceteraj estas junaj. Sub la direktado de Liŭ Ĝiŭej la taoistoj recitas sutrojn matene kaj vespere ĉiutage, faras necesajn laborojn de la templo, esploras taoismon kaj faras ritojn en ĉiuj gravaj festoj.

Estas multaj taoismaj festoj. La plej solena festotago estas la

15-a de la dua monato laŭ la ĉina luna kalendaro, ĉar en tiu tago naskiĝis Tajŝang Laŭĝjun. Taoismo estas politeismo. La plej alta el la dioj por la taoistoj estas Tajŝang Laŭĝjun, alinome Laŭzi. Laŭzi portis la nomon Li Er, la adoptan nomon Dan kaj estis filozofo de la periodo de Prin-tempo kaj Aŭtuno (770 — 476 a.K.). Li verkis «Sutro pri Virttoj». Poste la taoistoj prenis lian sutron kiel sian ĉefan kriterion, diigis Laŭzi kaj kultis lin kiel fondinton de sia religio. En tiu tago oni faras riton, la taoistoj gongas, sonigas muzikilojn kaj recitas sutron. La rito daŭras tri tutajn tagojn.

Oni diris, ke “antaŭ ol eniri en la templon, oni palpu la simiojn”. Sur la muro de la arkpordo estas gravuritaj du malgrandaj simioj, kiuj sin kaŝas en la dekoracia bareliefo. Kiuj palpos ilin, tiuj feliĉiĝos. Tial vizitantoj kutime iras palpi la ŝtonajn simiojn antaŭ ol eniri.

Post la pordo estas Linggŭan-halo, en kiu oni kultas la dian generalon Linggŭan patronantan juron. Li alte tenas ŝtalan vipon en la dekstra mano kaj starigas unu el la fingroj de la maldekstra. Lia ruĝa barbo falas ĝis la brusto kaj liaj okuloj rigardas gardeme. Post tiu halo estas kvar aliaj. En la tria halo estas la statuo de Ĉiŭ Ĉangĉun, fondinto de Longmen-skolo de taoismo. Ĝingis-Hano kultis lin kiel dion. Li estris la templon kaj direktis la tutlandajn taoistojn. En 1227 li forpasis en la aĝo de 80 jaroj. Liaj disĉiploj enterigis lin en la templo kaj konstruis por li la halon. Meze de la halo estas granda ligna pelvo plena de tuberoj. La restaĵoj de Ĉiŭ Ĉangĉun estis enterigitaj sub la ŝtona bazo de la pelvo. La giganta tuberplena pelvo estis donacita de imperiestro

Ĉjanlong (1711 — 1799 p.K.) de Ĉing-dinastio (1644-1911). Kunportante la pelvon, taoistoj de la templo povis rekte trairi la internan pordegon Umen de la Imperiestra Palaco, por kvesti ĉe la kortego.

La plej malantaŭa halo estas duetaĝa. La supra etaĝo estas Sanĉing-halo, en kiu staras tri altaj statuoj de dioj plej respektataj de taoistoj. La fundamenta kredo de taoismo estas tao, kio estas rigardata kiel origino de la universo. La meza dio estas Jŭanŝi Tjanzun. Li tenas en la mano grandan globon, kiu simbolas la ĥaoson antaŭ formiĝo de la universo. La maldekstra estas Lingbaŭ Tjanzun, kiu tenas en la sino diskon simbolantan ekaperon de la tero kaj la ĉielo. La dekstra estas Daŭde Tjanzun, t.e. Laŭzi. Li tenas en la mano trezoran ventumilon, kiu simbolas la pratempnon.

La malsupra etaĝo estas Siju-halo, en kiu staras kvar dioj. Unu el ili estas la Ĉiela Imperiestro. Aliaj du estas liaj asistantoj prizorgantaj la sunon, lunon, stelojn,

klimaton kaj militajn aferojn de la homa mondo. La kvara estas diino prizorganta generadon.

En la okcidenta korto de la templo estas ankoraŭ kvar haloj. En la haloj Baŝjan kaj Ljuzu estas ok statuoj de feoj, kies anekdotoj vaste cirkulas inter la ĉina popolo.

En Jŭanĝjun-halo estas kvin diinoj. Antaŭe senĉese venis piam virinoj por preĝi al la diinoj, ke la lastaj protektu ilin kontraŭ katastrofoj kaj donu al ili ĉarmajn bebojn.

En Jŭanĉen-halo pendas tridek pentraĵoj faritaj de kortegaj artistoj de Ĉing-dinastio. Sur ĉiu pentraĵo estas du generaloj. Nun oni skulptas la statuojn de la 60 generaloj. Kredeble la halo fariĝos multe pli impona.

Plej malantaŭe de la templo estas ĝardeno. Tie estas kioskoj kaj pavilonoj, kiujn interligas koridoroj kaj klostroj. Meze de la ĝardeno estas rokaĵoj peze ombritaj. La kvieta medio estas bona loko por memkulturado de la taoistoj.

Portalo antaŭ Bajjun-templo





Polaj artistoj en prezentado

“FLORO DE ORIENTA EŬROPO” EN ĈINIO

Fotoj de HAJ FENG

Artistoj de ambaŭ landoj




INTER la 6-a kaj la 25-a de nov. 1984, la Pola Ŝtata Ensemblo “Mazowsze”, kiu estis honorita kiel floro de orienta Eŭropo, faris brilan prezentadon en la ĉinaj urboj Ŝenjang, Tjanĝin kaj Pekino. Ĝi vizitis Ĉinion en 1953 kaj 1960.

La ensemblo “Mazowsze” estis iniciatita de fama pola komponisto Tadeuhz Sygietyński kaj lia edzino, scena artistino Mira Zieminska Sygietyńska en 1948. Ili klopodis por surscenigi popolajn kantojn kaj dancojn de Pollando. Por tio ili faris grandan penadon kaj lasis siajn spurojn en ĉiuj vilaĝoj de la regiono Mazowsze. En 1951, “Mazowsze” debutis kun granda sukceso.

Malfeliĉe, s-ro Sygietyński forpasis en 1955. Lia edzino Mira Zieminska daŭrigis lian nefinitan aferon. Post la tridekjara klopodado la ensemblo “Mazowsze” fariĝis perlo de la nacia arto de Pollando.



Polaj artistoj en kantado kaj dancado



Ĉe la Dek Tri Maŭzoleoj

La ensemblo "Mazowsze" alte taksas la amikecon inter si kaj la ĉina popolo. Por memori la vizitojn al Ĉinio, ĝi starigis en sia loko monumenton kun gravurita surskribo "1953, 1960, Ĉinio".

La Pola Ŝtata Ensemblo "Mazowsze" altiris al si la ĉinajn spektatorojn per buntaj kaj harmonie aranĝitaj kostumoj, viglaj dancoj kaj belsonaj popolaj kantoj kun originala stilo kaj harmo-

nia melodio. La artistoj de la ensemblo faris per sia prezentado novan kontribuon al la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Pollando.

Ulanfu, vicprezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, gratulas la artistojn pro ilia bela prezentado.





Ĉe la vin-akcepto aranĝita de la pola ambasadorejo en Ĉinio por la ensemblo. De dekstre: Pola ambasadoro, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco s-ro Goŭ Pejĵuan, estro de la ensemblo s-ino Mira Zieminska Sygietyńska kaj s-ro Ŭang Bingnan, prezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj.

Sur la Granda Muro



FINNA KAMPARANO HOFFREN KAJ ĈINIO

LA 7-an de majo pasintjare, Lkondolencna telegramo de la ĉina ambasadorejo estis sendita al malnova ligna domo en la gubernio Maanika meze de Finnlando, lando kun milo da lagoj.

La mastro de la domo nomiĝis Viljo Hoffren, unu el la centmiloj da ordinaraj kamparanoj de Finnlando.

Hoffren entreprenis kultivadon de 65 hektaroj da agroj kaj 72 hektarojn da arbaroj, li estis laŭdata kiel fama spertulo pri terpomoj en Finnlando. Kiel kamparano li tre interesiĝis pri la historio kaj kulturo de diversaj landoj. En la pasintaj jaroj li informiĝis el ĵurnalo, ke dank'al persisto de apogo sur siaj propraj fortoj, Ĉinio solvis problemon de manĝo por sia miliardo da loĝantoj, tion li multe admiris. Li vidis, ke en Ĉinio regas vicleco, kaj deziris koni la spiriton kuraĝigantan la ĉinojn antaŭenmarŝi.

Leginte librojn pri Ĉinio Hoffren trovis, ke la kamparanoj multe antaŭenpuŝis la ĉinan historion. En 1976, kiel kamparano li unuafoje aliĝis al mempaga vizit-grupo al Ĉinio organizita de la Finna-Ĉina Amikeca Asocio (FĈAA). Dum la vizito, li propraokule vidis la aktualan staton de Ĉinio, kaj tiu diligenta kamparano eksentis sian koron intime interligita kun tiu de la ĉina

popolo, kiu per sia tradicio de diligenteco kaj antaŭenstrebado vekis ĉe li grandan emocion. Post la vizito li fariĝis membro de FĈAA. Ekde tiam, io nova venis en lian vivon: konigi Ĉinion.

Maanika estas malproksima gubernio kun malpli ol kvin mil loĝantoj. Iuj el ili sciis nenion pri Ĉinio, aliaj havis eĉ antaŭjuĝon pri ĝi. Hoffren kolektis lumbildojn prenitajn en Ĉinio, verkis artikolojn pri la vidaĵo en Ĉinio, faris raportojn al lernejoj, kluboj por gejunuloj, kamparana asocio kaj aliaj organizaĵoj kaj projek-


ciis lumbildojn en ĉiuj kunvenoj por vaste konigi Ĉinion. En kelkaj jaroj li faris dekojn da tiaj raporto.

Hoffren ĝuis prestiĝon en la gubernio Maanika pro sia riĉeco, malegoismo kaj fervoreco al la publiko. La lokanoj elektis lin kiel prezidanton de la lakta kooperativo de la urbo Kuopio kaj de la akcia banko de Maanika. Kiam li konigis Ĉinion, li ĉiam parolis pri konkretaj faktoj, kiujn li vidis propraokule en ĝi. Li tion faris tute sen troigo kaj kaŝo de mankoj. Inluite de li, ĉ. 200 personoj en la gubernio Maanika aliĝis al FĈAA en la pasintaj jaroj.

FĈAA estas amasa organizaĵo, al kiu la registaro tre malmulte subvencias. En 1978, kiam okazis financa krizo al la asocio, Hoffren senhezite donis al ĝi dek mil finnajn markojn por helpi ĝin transponti la malfacilaĵojn. Li multfoje diris: "Se la asocio renkontos malfacilaĵojn en la financo, ĝi ne forgesu Hoffren, membron en la gubernio Maanika."

S-ro Hoffren akceptas ĉinajn gastojn en sia hejmo.





S-ro Hoffren kaj lia fileto kun ĉinaj gastoj antaŭ sia domo

Dum 6-7 jaroj Hoffren abonis ĉinajn gazetojn kaj mendis ĉinajn librojn por doni ilin al siaj amikoj. Kiam la ĉina pentraĵa ekspozicio de la Hu-guberniaj kamparanoj okazis en Kuopio proksime al lia hejmloko, li kondukis sian veturilon tien por transporti objektojn kaj aranĝi la eksponejon. Kiam FĈAA okazigis ekspozicion por vendi ĉinajn varojn, li estis volontulo por la vendado. Iufoje, kiam la delegacio de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj vizitis Finnlandon, li kiel mastro aranĝis feston en sia hejmo por esprimi la amikecon de la finnlandaj kamparanoj al la ĉina popolo. Dank'

al lia helpo, okazis en Maanika la ekspozicio pri ĉinaj novjaraj pentraĵoj.

La Kristonasko de 1983 koincidis kun la 60-a datreveno de la naskiĝo de Hoffren. En la bankedo li diris al siaj samvilaĝanoj: "Mi volas viziti Ĉinion ankoraŭfoje." Ĉe la rememoro lia filino Anna diris: "Mia paĉjo suferis de kardiovaskula malsano. Li ofte prenis urĝsavan medikamenton. Komence FĈAA aranĝis, ke li vizitu Ĉinion en 1985, sed li konsciis, ke restos al li mallonga tempo por vivi, tial li multe esperis kiel eble plej frue realigi la viziton, la lastan deziron en la vivo."

En la mezo de aprilo lastjare, Hoffren, kiu estis ĵus elektita kiel konsiliano de FĈAA, vojaĝis al Pekino, Ŝĵian, Ĉengdu kaj Kantonon. Li trovis, ke la disvolviĝo en Ĉinio dum tiuj jaroj estas pli ĝojiga. La 1-an de majo, li revenis al Helsinko. Vidante reprezentantojn de FĈAA en la flughaveno, li diris: "Tre bone! Ĉinio havas grandegan ŝanĝon." Ekster ĉies atendo, ke la 6-an de majo, kiam li laboris sur kampo, li forpasis pro subita miokardia infarkto.

Hoffren ja estis kamparano, kiu tutkore laboris por akceli la amikecon inter Finnlando kaj Ĉinio.

Karikaturoj

ALKUTIMIGO

Kelnero portas bovlon da supo al kliento kun sia dikfingro en la supo. La kliento atentigas: "He, via fingro . . ." "Ne gravas. Mi jam kutimiĝis kaj ne timas brogon."



PLUVIMUNA

Kliento volas aĉeti mantelon el lepora pelto.

"Tre plaĉas al mi la mantelo, sed, ĉu ĝi timas pluvon?"

"Kompreneble ne," respondis la komizo, "ĉu vi iam vidis leporon sub pluvombrello?"

EL LETEROJ DE NIAJ LEGANTOJ

Mi komencis lerni Esperanton sole en 1955. Dum longa tempo mi ne havis eblecon legi ion ajn. Antaŭ unu jaro hazarde mi enflalis en vian revuon "EPC", kiu altiris mian atenton, kaj mi senhezite decidis aboni ĝin por la jaro 1984.

Mi ĝojas, kiam mi vidas kiel vigle disvolviĝas la lernado de la Internacia Lingvo en via lando. Ĉar mi scias tre bone, ke la plej granda lando de la mondo, kiel la via kun miliardo da loĝantoj kaj kun unu lingvo tre malfacila por alilandanoj de la mondo, ne estas taŭga por komunikado en la nuna epoko en kiu ni vivas. Ĝuste nun venis en mian kapon la ideo, ke se via registaro insistas antaŭ la Unuiĝintaj Nacioj pri pli rapida enkonduko de la Internacia Lingvo kiel lingvo por komunikado inter la popoloj de la mondo, tiel de unu flanko UN ŝparos multe da mono kiu ĝis nun elspeziĝas por interpretado de diversaj lingvoj, kaj povas uzi la ŝparitan monon por la disvolviĝo

de la malpli riĉaj landoj, kaj de alia flanko la lingvo ludos gravan rolon por la paco en la mondo por kiu ni ĉiuj aspiras. Mi estas 70-jara kaj mi volas antaŭ mia morto vidi — unu mondon, unu lingvon.

MILENKOV MLADEN (Belgio)

Neniam aperas ĉina vidpunkto pri gravaj aktualaĵoj. Donu 1 paĝon al "plej grava politika (aŭ ekonomia) fakto monata" laŭ ĉina opinio.

1. Al revuo mankas amuzaj rakontoj, ĉinaj spritaĵoj kaj plu fabeloj; 2. Ĉu vi povus aldoni vortareton en ĉiuj ekzempleroj, kun vortoj uzitaj en artikoloj, kio ne estas de komuna aplikado? 3. Ŝajnus en kelkaj fotoj, ke la homoj (gejunuloj kaj gemaljunuloj) pozas por foti, kaj la impresoj ne estas natura (bedaŭrinde). Mi preferas subitfotojn, naturajn, kvankam la homoj ne estis ride-tantaj.

ROBERTO GUILLERMO PONS (Argentino)

Kun bedaŭro mi sciigas al vi, ke mia edzo, Henry Steendahl, mortis la 22-8-84 post longa kaj streĉa malsano. Pro tio vi ne plu devas sendi al mi EPC, ĉar mi ne estas same sperta en la lingvo kiel mia edzo. Tamen mi ĉiam ĝuis la bel-ilustritajn gazetojn, sed ne povis multe legi.

Mi volas rakonti al vi, ke mia edzo en la lasta tempo de sia vivo kun granda ĝojo kaj intereso konstante legis EPC kaj ĉiam entuziasme rakontis kaj legis (tradukis) al kunpacientoj en la hospitalo pri la enhavo de la gazetoj.

En memoro de mia edzo mi deziras daŭrigan evoluadon al ĉiuj en via lando.

JOHANNE STEENDAHL
(Danlando)

Pro la forpaso de s-ro Henry Steendahl ni esprimas nian plej sinceran kondolencon al lia edzino Johanne Steendahl. Pro lia efika laboro dediĉita al nia revuo ni esprimas koran dankon.

La Red.

Mi ŝatas "Wushu"-sporton, tial mi petas vin ke vi aperigu "Wushu"-artikolon en via revuo. . .

MIRCEA DEZMIREAN
(Rumanio)

PLEJ MALFRUA DENTO

Instruisto: Kiu el la dentoj elkreskas plej malfrue?

Lernanto: Artefarita.



ANONCO

La redakcio de "El Popola Ĉinio" bezonas Esperantajn poŝtmarkojn. Kiu ajn bonvolas cedi al ĝi siajn posedaĵojn, bonvolu skribi al ĝi pri dezirata rekompenco.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Pri luktartoj deziras korespondi 18-j. junulo geknabojn el Azio. Leonardo Alcocer, San Jose 1197, 3000 Santa Fe de la Vera Cruz, Rep. Argentino.

* **NUR POR VI SENPAGE P.K.** 149 Bursa Turkio, ofertas ankaŭ dum la 1985-1986-1987 jaroj **SENPAGAN VIZITON** por ĉiu Esperantisto kiu varbas 3 neesperantistojn al nia turisma aranĝo **ESPERANTO PRAKTIKO EN TURISMO**. Por ĉiu plia varbita neesperantisto, la varbanto ricevas kuponon, kiu servas por enpago de kostoj en alia esperanta aranĝo. Unusemajnaj progra-

moj komencas ĉiujare post unua dimanĉo kaj finas en la mateno de antaŭlasta dimanĉo de la jaro. La kostoj estas 104 usonaj dolaroj. Kondicioj: duaklasa hotelo, restoracio, programo. Ekskursoj, muzeoj. Pri aliĝo indiku minimume du eblajn semajnojn.

* Shawn Colins (30 jaroj), dez. kor. pri Tajĝiĉuan, klasika muziko, religioj, mistikismo, arto, lingvoj, parapsikologio, turismo, okulta scio, kultura interŝanĝo. Adreso: 2531 9th, Boulder, CO. 80302 Usono.

* Tadeusz Kaminski, ul. Kaszlanowa 31/91, 87100 Torun, Pollando, dez. kor. pri fotografio kaj turismo.

* S-ro Haraga Ioan, Micro 3, Bloc A3, Ap38, Buzaŭ-5100, Rumanio, (34-j. geografo), dez. kor. tutmonde esperante, france, angle, hispane kaj germane pri diversaj temoj. Respondo certa.

* Jaime Calero P., Apartado Aereo 15768, Bogota, Colombia, Sur America, deziras korespondi.

* Albert Gilla (14j.), Str. Principala Nr. 165, 4127 Danesti, Harghita Rumanio, dez. kor.

kun amikoj ĉefe el Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio.

* Fulop Annamaria (14j.), Str. Principala Nr. 242, 4141 Cirta, Harghita Rumanio, dez. kor. kun amikoj el Hungario, Germanio, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio.

* 22j. pola studento Mieczyslaw Szydowski, ul. Ogródowa 5/4, 65-461 Zielona Gora, Pollando, dez. kor. kun ĉinoj pri turismo, sporto, filmo kaj foto.

* 19j. fraŭlo el Irano dez. kor. Skribi bv.: Djavad Kamili, Saadabad Szuare, Pharmacy pars, Mashhad, Irano.

* 50-j. komencanto dez. kor. tutmonde. S-ro John Matthews, 118 Rimblston Avenue Elenrothes, Fife KT6 2DP, Scotland, U.K.

* Pri kuirarto deziras korespondi kaj receptojn, interŝanĝi en la tuta mondo. S-ino Balazs Aliz, Rumanio RO-4200 Gheorgheni Jud. Harghita P.O. Kesto 40.

* 19-j. lingvostudento dez. kor. tm. pri lingvistiko, literaturo, kultura historio kaj klasika/popola muziko. Joakim Enwall, c/o Berht, Tuleg. 42, 172 32 Sundbyberg, Svedio.

SCIIGO

TRADUKADO de la artikoloj en EPĈ por aperigo en nacilingvaj gazetoj, represo de niaj artikoloj en naciaj aŭ internaciaj E-revuo kaj reaperigo de niaj fotoj aŭ bildoj en gazetoj estas ĉiam permesataj kaj bonvenaj.

Ni nur petas, ke oni sendu al ni (EPĈ, P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio) po 3 ekz. de la revuo aŭ gazeto, en kiu aperas la traduko aŭ represaĵo de niaj artikoloj, fotoj aŭ bildoj. Antaŭdankon.

La redakcio de El Popola Ĉinio

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuo

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:


MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

**FOTOJ FARITAJ
DE E-ISTOJ**



Soifa birdo ĉe fontano
de **REGINALD T. HARLING**
(Usono)

Hirunda Akvojalo de **PHYLLIS PURNELL** (Anglio)



8157

志学画 辛酉年 初秋

